

F. FAULHABER

Ne tiel,
sed tiel ĉi!

Konsilaro pri stilo



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio

Avda. de San Pedro 12 - 3º - 7, E-28018 MADRID
Tel. 434 - (01) - 4188079

16x19996ef002518yy



F. FAULHABER **Federación Española de Esperanto**
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (91) 4468079

NE TIEL, SED TIEL CI!

Konsilaro pri stilo

FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO
★
BIBLIOTECA



DANSK ESPERANTO FORLAG

AABYHØJ 1965



Presejo:

A/S MODERSMAALETS TRYKKERI

HADERSLEV

ENKONDUKO

Kun granda ĝojo ni povas konstati, ke en la lasta tempo denove regule aperas Esperantaj libroj. Ilia stilo estas ofte vigla kaj modela.

Tamen, ni neniel povas malhelpi, ke aperu libroj, kiuj ankoraŭ ne estas maturaj por esti eldonataj, ĉar nek la frazokonstruo, nek la lingvouzo, nek la vortelektado estas rekomendindaj. Kaj tiajn librojn ni prefere ne vidas en la manoj de niaj komencantoj.

Niaj multaj gramatikoj ne donas al ni konsilon sur tiu ĉi tereno kaj ni estas embarasitaj, kiamaniere ni klarigu al la novaj (kaj ankaŭ al multaj malnovaj!) esperantistoj, kiel ili uzu Esperanton kaj kial ili ĝin uzu ĝuste tiel kaj ne alie.

Tial estas ĝojiga fakto la apero de tiu ĉi libreto, cetere rezultato de multjara laborado, komparado, serĉado kaj spertado. Ĉar sinjoro Faulhaber, akademiano kaj konata recenzanto, verkis multajn artikolojn, kompilis gramatikajn librojn, i. a. la por kursgvidantoj en Nederlando tre konatan kaj de post tridek jaroj ankoraŭ ĉiam uzatan konsilanton „Tra la labirinto de la gramatiko“; li tradukis la faman teatraĵon „La mondo ne havas atendejon“ (kiun oni el Esperanto tradukis en diversajn lingvojn), la spritajn librojn „Papalagoj“, „La nevenkebla ĝeno“ kaj „Dekkinga fuĝas“.

En la nuna libro „Ne tiel, sed tiel ĉi . . .“ li bone kaj por ĉiuj kompreneble klarigas, kial certaj frazoj, kiujn li kolektis el tre diversaj eldonaĵoj, ne estas bonaj kaj kial la ekzemplo de li donata estas pli konsilinda. Li nenie devigas, nenie altrudas sian opinion, li simple prilumigas la aferon. Li diras per kelkaj simplaj vortoj tion, kion al ni ne instruas la elementaj lernolibroj kaj kion ni nur post grandega peno kaj koncentriĝo sukcesus lerni.

La verkinto de „Ne tiel, sed tiel ĉi“ volas neniun ofendi kaj tial li ne nomas siajn fontojn. Lia intenco ne estas kritiki la jam aperintajn (kaj ofte ne plu aĉeteblajn) verkojn, sed simple nur instrui la multajn, kiuj sentas bezonon por lerni pli multe, pli intense, pli facile kaj pli rapide, ol tio eblas el la diversaj lernolibroj por Esperanto.

La libro „Ne tiel, sed tiel ĉi“ estos grava helpilo por studentoj kaj kondukilo por necertuloj.

E. Burgler-Jezsó,
red. de „La Praktiko“.

Antaŭparolo.

Kiel lingvo internacia Esperanto estas uzata de multaj popoloj. Pro tio ĝiaj stilo kaj esprimmaniero estas facile influeblaj de diversaj lingvoj naciaj. Feliĉe ni disponas pri imitindaj modeloj, nome la verkoj de Zamenhof — i. a. la tiucele kompilita „Fundamenta Krestomatio“ — kaj de aliaj bonaj aŭtoroj kaj tradukintoj. La imitado de ilia stilo kaj la konstanta kritiko de recenzantoj gardas la lingvon kontraŭ disfalo en dialektojn kaj tenas ĝin sur la mezo de la evolua vojo. Tiel estiĝis internacie unueca stilo, kiu faras la lingvon ĉie en la mondo facile komprenebla.

Tiun stilon oni ne povas lerni el elementaj lernolibroj, sed oni ĝin devas proprigi al si per legado kaj relegado de niaj plej bonaj aŭtoroj. Ĝenerale oni tro frue post la elementa kurso partoprenas ekzamenon aŭ verkas originale aŭ traduke por iu Esperanta organo aŭ revuo, nome sen antaŭa studo de la literaturo por lerni la Esperantajn stilon kaj esprimmanieron. Pro tio oni ofte povas legi tra tiaj tradukoj la originalan lingvon kaj tra la originalaj verkaĵoj la naci-lingvan esprimmanieron. Tiaj tekstoj ofte donas al alinacianoj malklarigan impreson pri ilia senco aŭ faras la signifon nekomprenebla. Ne malofte la verkintoj montras eĉ mankon de la plej elementa scio koncerne la regulojn pri bona stilo, regulojn, kiuj validas ne nur por Esperanto, sed por ĉiuj lingvoj. Tiaj tekstoj estas lingve nematuraj, kiom ajn bone la verkintoj scias la gramatikon.

Ĝis nun ne ekzistis en nia lingvo detala kaj sistema traktaĵo pri tiu temo. Tiurilataj gazetartikoloj estas tro fragmentaj kaj limigas sin nur al ĝeneralaĵoj, al nebulaj konsiloj, kiujn la studanto ne scias utiligi al si pro manko de konkretaj ekzemploj kaj ekzercoj.

Tial ni verkis ĉi tiun gvidilon, kiu, instruante per kontrastoj, volas vekigi guston pri bona stilo.

Lasante la kreadon de belo al literatura artisto, ni donas nur praktikajn konsilojn, per kiuj oni povas akiri bonan, almenaŭ tolereblan

stilon, same kiel instruo pri skribado celas ne kaligrafion (belskribadon), sed kurantan manskribon, kiun ĉiu homo per multe aŭ malmulte da ekzercado povas akiri.

La ekzemplojn, kiujn ni uzis, ni ne mem elpensis, sed prenis al la ekzistanta literaturo. Cetere ni utiligis niajn spertojn akiritajn dum la kontrolado de manuskriptoj por la iama Literatura Komitato de F. L. E. kaj nuna de S. A. T., dum la legado de recenzotaj verkoj kaj kiel ano de la ekzamena komitato en nia lando.

„Ne tiel, sed tiel ĉi!“ ne pretendas esti kompleta lernolibro pri stilo, sed nur unua paŝo al pli detala studilo, kiu — same kiel tiu ĉi — servu al la ordinara esperantisto, kiu post sia lerneja instruigo ne multe aŭ tute ne okupis sin pri lingvaj aferoj.

1. Kio estas stilo?

La vorto *stilo* devenas de la latina *stilus*, la skribilo de la antikvaj romanoj: bastoneto, kiu havis ĉe unu ekstremo pinton, ĉe la alia plataĵon. Per la pinto ili skribis, kion ili volis memori, sur tabuleton, kovritan per vakso, kaj per la plataĵo ili glatigis la vakson, kiam ili ne plu bezonis la notaĵon aŭ volis fari en ĝi ŝanĝon.

La nomon *stilus* ili rilatigis ankaŭ kun la skribitaĵo kaj tiam ĝi signifis *skribmaniero*, kaj en tiu signifo ni konas nun la vorton *stilo*. Komparu ĝin ekzemple kun la vorto *plumo* uzata en simila senco, kaj kiu antaŭe signifis nur „tubeto kun lanugo, el kiuj konsistas la kovraĵo de la korpo de l' birdoj“ (Kabe: Vortaro de Esperanto). El anserplumo oni faris ilon por skribi, fendante kaj pintigante ĝin per tiucela tranĉileto, kaj tiam la vorto *plumo* ricevis ankaŭ la signifon *skribilo*. Poste oni faris skribilon el ŝtalo, sed la nomo *plumo* restis. Kaj nuntempe ni konas eĉ *font*plumon!

El la uzado de plumo-por-skribado estiĝis kelkaj esprimoj, ekz. pri iu, kiu skribis amare, ni diras, ke „li trempis sian plumon en galon“; kiu skribas akre, „havas akran plumon“, kaj kiu verkas bonstile, „havas plumon bone tranĉitan“.

Simile vastiĝis la signifo de la vorto *stilo*: la *skribilo* iĝis ankaŭ la *skribmaniero*. En tiu signifo *stilo* povas havi diversajn ecojn: ĝi povas esti bela aŭ malbela, konciza aŭ malkonciza, simpla aŭ mal-simpla, flua aŭ rigida, eleganta aŭ vulgara, peza aŭ malpeza, k. t. p. laŭ la maniero, en kiu oni sin esprimas. Ekzistas ankaŭ pure persona stilo, per kiu iu aŭtoro distingiĝas de aliaj aŭtoroj. Laŭ tia stilo oni eĉ povas rekonii la verkinton.

Ankaŭ diversaj temoj havas sian propran stilon. En tiu senco ni konas stilojn ofican, komercan, juran kaj predikan aŭ „katedran“. Propran stilon havas, fine, ĉiu lingvo, nome ĝeneralan esprimmanieron, vortordon, frazkonstruon kaj spiriton, kiuj kune formas la kanvason, sur kiu oni brodas la personan, la fakan kaj la okazajn stilojn.

2. Bona stilo estas bonsona.

Oni povu laŭtlegi tekston sen granda peno. Vortoj kaj frazoj devas flui kiel eble plej libere kaj facile.

a) Interpuŝiĝo de sonoj ne facile elparoleblaj.

Se eble, evitu do tiajn interpuŝiĝojn-de-sonoj, kiaj ofendas niajn orelojn, malfaciligas la elparolon, kaŭzas malklarecon aŭ ebligas miskomprenon, ekz.:

A	B
Ne tiel sed tiel ĉi.*
lingvuzo	lingvouzo
lingvekzerco	lingva ekzerco
urbplaco	urboplaco, urba placo
vivformo	vivoformo
sorbpapero	sorba papero
gorĝŝire	gorĝoŝire
fokkaptado	fokokaptado, kaptado de fokoj
prooflugo	provoflugo
ŝarĝĉevalo	ŝarĝoĉevalo
leglibro	legolibro
lasttempo	lastatempe, en la lasta tempo
studtempo	studotempo, tempo por stud(ad)o
provvojaĝo	provovojaĝo
freŝsanga	freŝasanga
fiŝsupo	fiŝosupo, fiŝa supo
akvfalo	akvofalo
rabbesto	rabobesto
poŝspiegulo	poŝa spegulo
flugkapablo	flugokapablo, kapablo por flugi
pluvfalo	pluvofalo
ĉerizsuko	ĉeriza suko
ovforma	ovoforma
mangajzorgo	zorgo pri mangajo
venĝsento	venĝosento
nigrhara	nigrahara
sorĉŝanĝi	sorĉe ŝanĝi
lavvazo	lavovazo
de l' libro	de la libro
de l' avo	de la avo

* La korektoj, kiujn ni donas en la rubrikoj B: "... sed tiel ĉi" estas nur *provoj* de korekto, do neniel absolutaj. Ĉefafero estas, ke oni konstati, kio estas preferinda kaj kio estas nepreferinda.

mirrigardi
nevnjo
sublima*
plugkampo

atendĉambro
largŝultra
ludtumulti
riĉsukcese
bridteni
bazsigno

mire rigardi
nevinjo
sub la limo
plugata kampo, kampo por plug-
ado
atendejo
largŝultra, kun largaj ŝultroj
ludante tumulti
kun riĉa sukceso
bride teni, teni per brido
baza signo

Kiel oni vidas, ekzistas diversaj solvoj:

- aldono de interlitero, ekz.: urboplaco, nigrahara, legolibro;
- disigo de la elementoj, ekz.: ĉeriza suko, sorba papero, poŝa spe-
gulo;
- priskribo: kapablo por flugi, zorgo pri manĝaĵo, kun largaj ŝul-
troj.

Ne en ĉiuj kazoj tiaj kolizioj de sonoj estas eviteblaj, sed oni klopodu kiel eble plej multe eviti ilin.

b) Ripetiĝoj.

Same malbele sonas en kelklinia spaco la ripetiĝo de iu sono aŭ vorto, ekz.:

A

Ne tiel

La lulilo iĝis por ŝi konsolo; por ŝi ĝi ne estis senviva objekto: por ŝi ĝi havis animon kaj vivon.

Ĝi estis la unua kion ŝi vidis, matene kiam ŝi vekiĝis, vespere kiam ŝi venis hejmen. Kiam ŝi nokte vekiĝis, ŝi etendis sian manon kaj palpis la molajn litkovriletojn, — post tio ŝi ree endormiĝis, tenante ion de ĝi en la mano. Sed vespere ĝi estis ŝia plej granda feliĉo. Tiam ŝi sidis ĉetable apud la lulilo, kudrante

B

. . . sed tiel ĉi.

La lulilo iĝis por ŝi konsolo; por ŝi ĝi ne estis senviva objekto, sed havas animon kaj vivon.

Ĝi estis la unua, kion ŝi vidis, matene ĉe la vekiĝo kaj vespere post la reveno hejmen. Vekiĝinte en la nokto, ŝi etendis manon kaj palpis la molajn litkovriletojn — poste ŝi denove ekdormis, tenante ion de tio en la mano. Sed ŝia plej granda feliĉo ĝi estis vespere. Tiam, sidante ĉe la tablo apud la lulilo kaj kudrante la

* sublima (neologismo, sed internacia).

la etajn vestojn. Kaj ŝi imagis, ke etajn vestojn, ŝi imagis la infanon jam naskiĝis; ŝi dolĉe babiladis kun ĝi, donis al ĝi karesnomojn

En kolono A svarmas ripetigoj de siblaj sonoj kaj de kelkaj vortoj: *ŝi, ĝi, iĝi* . . . Tio sonas malbele. Tial estas konsilinde, laŭte legi vian verkaĵon, por ke viaj oreloj kaj lango atentigu vin pri tio.

Per uzado de participoj, per kuntiro de frazoj, per apliko de sinonimoj kaj per diversaj aliaj manieroj oni povas eviti malbelajn sonkombinojn kaj malmultigi tro ofte uzatajn sonojn kaj vortojn, aŭ fari ilin malpli orelfrapaj.

Legu laŭte ĉi suban tekston en kolono A. Kovru kolonon B kaj klopodu korekti la tekston A tiel, ke ĝi ne tro malfaciligas la elparolon:

A

Ne tiel

Ŝi rigardis al la amaseto da infanvestoj, ĝis ĉio komencis turniĝi ĉirkaŭ ŝi kaj ŝi ŝanceliĝante serĉis apogon. La maljuna virino kaptis ŝin ĝustatempe kaj sidigis ŝin sur seĝo.

B

. . . sed tiel ĉi.

Ŝi rigardis al la amaseto da infanvestoj, ĝis kiam ŝi eksentis kapturiniĝon; ŝanceliĝante, ŝi serĉis apogon. Ĝustatempe la maljuna virino ŝin kaptis kaj sidigis sur seĝo.

Rimarkoj:

Anstataŭiginte la vortojn „ĝis ĉio komencis turniĝi ĉirkaŭ ŝi“ per „ĝis kiam ŝi sentis kapturiniĝon“, ni forigis kelkajn kuniĝintajn siblajn sonojn. La signifon ni tamen konservis, ĉar vidante, ke „ĉio komencas turniĝi ĉirkaŭ ŝi“ ŝi ja sentas kapturiniĝon.

Anstataŭ: „la maljuna virino kaptis ŝin ĝustatempe kaj sidigis ŝin sur seĝo“, ni skribis: „ĝustatempe la maljuna virino ŝin kaptis kaj sidigis sur seĝo“, tiel dismetante la siblajn sonojn. La vortojn „kaptis ŝin“ ni ŝanĝis en „ŝin kaptis“ por eviti kolizion de „s“ kun „ŝ“ kaj pro tiu modifo la dua „ŝin“ (en „sidigis sin“) iĝis superflua.

Averto:

Oni bone komprenu, ke la celo ne estas kiel eble plej multe eviti iujn sonojn. Ni nur instigas, *se eble* eviti ilian *amasigon en malgranda spaco*, se tia amasiĝo sonas malbele aŭ kaŭzas tro de penado al nia lango aŭ faras la frazon malklara kaj pro tio malfacile komprenebla por la oreloj. Do, se oni laŭtelegante, ne konstatas tiajn malbonaĵojn, korekto ne necesas. Por esti korektata la malbonaĵo devas altrudiĝi.

Ni avertas pri tio, por ke oni ne uzu mikroskopon por esplori sian stilon kaj tiel malutilu al la flua, natura esprimado de siaj pensoj. Alivorte: por helpi iun grimpi sur ĉevalon, oni donu al li puŝon nur tiom fortan, ke li sidiĝu ĝuste sur la dorso de la besto. Sed la puŝo ne estu tro forta, por ke li ne falu aliflanke sur la teron. Troigo malutilas!

En jena teksto malagrabla trafas nin en kolono A la ofta apero de la vorto *libreto*:

A

Ne tiel

„Societa ludaro por hejmo kaj ekskurso“ de J. Rosenberg, 48-paĝa libreto.

Ofte mankas al ni gvidlibroj, per kiu ni povus fari niajn vesperkunvenojn pli interesaj kaj kiuj donus al la kunvenantoj eblecon gaje kaj interese pasigi vesperon, ekzercante la internacian lingvon. Ĉi tiun mankon penas forigi la aŭtoro. En la libreto troviĝas kolekto da zorge elektitaj ludoj, en kiuj la agado estas akompanata per interparoloj. La libreto enhavas 50 tiajn ludojn. Mi legis la libreton kun granda intereso kaj mi opinias, ke la libreto atingos sian celon, se la ludgvidantoj lerte aplikos ĝin. La lingvo de la libreto estas bona, flua kaj modela, la ludoj interesaj kaj facile kompreneblaj. Sendube la libreto estas grava helpilo por vivigi niajn vesperkunvenojn.

Rimarko:

Kiel oni vidas, ni diversmaniere evitis la ĝenan ripetigon de la vorto *libreto*. Kelkaj aliaj ŝanĝoj, kvankam ne nepre necesaj, faciligas la stilon.

Anstataŭ „legis ĝin“ kaj „aplikos ĝin“ ni skribis: „ĝin legis“ kaj „ĝin aplikos“. Tion ni faris por eviti, ke la ripetigo de „ĝin“ ŝoku la

B

. . . sed tiel ĉi.

„Societa ludaro por hejmo kaj ekskurso“ de J. Rosenberg, 48-paĝa.

Ofte mankas al ni gvidilo, per kiu ni povus fari niajn kunvenojn pli interesaj kaj ebligi al la kunvenintoj gaje kaj utile pasigi vesperon, ekzercante nin en la internacia lingvo. Ĉi tiun mankon la aŭtoro penas forigi. En lia verketo troviĝas kolekto da zorge elektitaj ludoj, en kiuj la agadon akompanas interparoloj. La libreto enhavas 50 tiajn ludojn. Mi ĝin legis kun granda interesiĝo kaj opinias, ke ĝi atingos sian celon, se la gvidantoj ĝin lerte aplikos. La lingvo estas bona, flua kaj modela, la ludoj interesaj kaj facile kompreneblaj.

Sendube ĉi tiu ludaro estas grava helpilo por vivigi niajn kunvenojn!

orelojn. En „mi legis ĝin“ kaj „la gvidantoj lerte aplikos ĝin“, la vorto „ĝin“ ja staras en la sunlumo, sed en „mi ĝin legis“ kaj „la gvidantoj ĝin lerte aplikos“, oni apenaŭ rimarkas tiun vorton, ĉar ĝi staras „en la ombro“.

Komparante la originalan formon de la tuto (A) kun la korektita (B), oni certe trovos, ke la lasta estas ne nur pli bonsona, sed ankaŭ pli malpeza.

Ankaŭ en jenaj tekstoj iuj vortoj ĝene ripetiĝas. Klopodu plibonigi ilin, kovrinte la kolonon B.

A

Ne tiel

1. Jaĉjo sentis la larmojn brulantajn post liaj palpebroj; li glutis por reteni ilin; li mordis sin sur sia lipo, li pugnigis siajn manojn en siaj pantalonpoŝoj; li kuntiris siajn piedfingrojn en siaj ŝtrumpoj.

2. En nia okazigita kunveno ni decidis okazigi la Zamenhofan vesperon la 20an de Decembro. Ĝi okazos en la granda salono de „Konkordo“.

3. Laŭte kriante li returnis sin kaj kuregis returne, el la aleo sur la pavimon.

4. Ĉe la lernejo la lernantoj jam svarmis. La lernantoj de la plej altaj klasoj estis malpli bruaj ol ordinare.

5. Tiuajn ujojn li poste devis plenigi per musko kaj poste lia patro verŝis akvon en ilin.

6. La tutan tagon la knabo fiŝkaptadis per la „kakevaj“, speco de malgranda najlotirilo. Li tiam lasis pendii en la akvo etan fiŝon el eburo kaj malrapide tiris ĝin antaŭen, tiel, ke ĝi kvazaŭ naĝis.

B

. . . sed tiel ĉi.

(*liaj, siaj*): Jaĉjo sentis la larmojn brulantajn post liaj palpebroj kaj glutis por reteni ilin. Li mordis la lipojn, pugnigis la manojn en la poŝoj de sia pantalono kaj kuntiris la piedfingrojn en siaj ŝtrumpoj.

(*okaz'*): En nia kunveno ni decidis okazigi la Zamenhofan vesperon la 20an de decembro en la granda salono de „Konkordo“.

(*returne*): Laŭte kriante li sin turnis kaj kuregis el la aleo sur la pavimon.

(*lernantoj*): Ĉe la lernejo la lernantoj jam svarmis. Tiuaj de la plej altaj klasoj estis malpli bruaj ol ordinare.

(*poste*): Tiuajn ujojn li poste devis plenigi per musko kaj tiam lia patro verŝis akvon en ilin.

(*liam*): La tutan tagon la knabo fiŝis per la „kakevaj“, kiu similas malgrandan najlotirilon. Tio okazis jene: li pendigis en la akvon etan fiŝon el eburo kaj malrapide ĝin tiris tiel, ke ĝi kvazaŭ

Tiam jen kaj jen granda fiŝo venis por vidi, kia fiŝeto tiu do estas. Tiam la knabo ne movis sin, ĝis la fiŝo estis tute proksima; tiam li subite kaptis ĝin per sia kakevajo.

7. Refoje puŝon, piedfrapon. Tiam ambaŭ knaboj kaptis unu la alian kaj baldaŭ ambaŭ rulis sur la vojo.

8. a) Ĉu estas permesate, ke Jaĉjo tiun ĉi posttagmezon venos kaj ludos kun ni? b) Nu, Panjo, ĉu estas permesate? c) Sinjorino, ĉu estas permesate al Jaĉjo kuniri kun ni? ĉ) Ho, sinjorino, ĉu estas permesate? d) Ĉu jes? Jaĉjo, estas permesate al vi!

9. Ŝi rekonsciiĝis, malfermis la okulojn kaj ĉe la rememoro larĝiĝis la okulojn kaj komencis histerie kriegi.

10. La trio sendecide restis staranta apud la ponteto. Baldaŭ ili jam vidis serviston de mastro Grumblulo alproksimiĝanta el la direkto de la biendomo. Tiam ili rapide estis forkurintaj. Unue ili estis kurintaj trans la ponteton kaj tra la paŝtejo, — poste ili estis grimptaj ĉirkaŭ latbarilo; poste ili estis saltintaj trans du fosaĵojn, kiuj feliĉe en la senpluva sezono ne estis tro larĝaj; ili estis rampintaj sub metalretaĵo el pikildrato; kaj fine ili estis alvenintaj sur digon kondukantan al la pavimvojo. Tie ili estis liberaj. Jaĉjo estis savinta la valizon de Tom.

naĝis. Jen kaj jen granda fiŝo venis por rigardi, kia fiŝeto tio estas. La knabo ne movis sin, ĝis la fiŝo estis proksime, tiam li ĝin subite kaptis per sia kakevajo.

(*ambaŭ*): Refoje puŝon, piedfrapon. Tiam la knaboj kaptis unu la alian kaj baldaŭ ambaŭ ruliĝis sur la vojo.

a) (*esti permesate*): Ĉu Jaĉjo povos veni kaj ludi kun ni ĉi tiun posttagmezon? b) Nu, Panjo, ĉu vi permesas? c) Sinjorino, ĉu Jaĉjo povas iri kun ni? ĉ) Ho, sinjorino, ĉu vi permesas al li? d) Ĉu jes? Jaĉjo, vi povas!

(*okuloj*): Ŝi rekonsciiĝis, malfermis la okulojn, kaj ĉe la rememoro larĝiĝis ilin kaj komencis histerie kriegi.

(*estis -inta*): La trio sendecide restis staranta apud la ponteto. Baldaŭ ili jam vidis serviston de mastro Grumblulo alproksimiĝanta el la direkto de la biendomo. Tiam ili rapide forkuris. Ili unue kuregis trans la ponteton kaj tra la paŝtejo — poste ili grimpis ĉirkaŭ latbarilon kaj saltis trans du fosaĵojn, kiuj en la senpluva sezono ne estis tro larĝaj; ili rampis sub barilon el pikildrato kaj fine alvenis sur digon kondukantan al la ŝoseo. Tie ili estis liberaj. Jaĉjo estis savinta la valizon de Tom.

11. Lia stando estis iom malproksime de la mia, sed mi povis vidi lin laboranta ĉe sia stando.

(*stando*): Lia stando estis iom malproksime de la mia, sed mi povis vidi lin laboranta tie.

12. Lia pajla ĉapelo pendis sur lia dorso; grandaj ŝvitgutoj rulis sur liaj rondaj ruĝaj vangoj; liaj dikaj kruroj moviĝis eksterordinare rapide; liaj piedoj obtuze sonis en la sablo de la aleo . . . Granda valizo, plenigita per komercaĵoj pendis sur lia brako.

(*lia*): Lia pajla ĉapelo pendis sur la dorso; grandaj ŝvitgutoj ruliĝis sur la rondaj ruĝaj vangoj; la dikaj piedoj moviĝis eksterordinare rapide; la paŝoj obtuze sonis en la sablo de la aleo . . . Granda valizo plenigita per komercaĵoj pendis sur lia brako.

13. Ho, ankoraŭ li vidas tiujn okulojn de Laŭ . . . Se Laŭ tiun matenon estus droninta!

(*estus -inta*): Ho, li ankoraŭ vidas la okulojn de Laŭ . . . Se Laŭ tiun matenon estus droninta!

Unu fojon Jaĉjo vidis ankaŭ Tomon fari angorajn grimacojn, nome tiun vesperon, kiam ili triope foriris por remi, kaj kiam Tom pendis de la ponteto . . . ; kaj li estis vidinta ankaŭ la katon de mastro G., kiam li trovis la timigitan beston en la arbetaro; sed tiu rigardo de Laŭ estis la plej terura . . . Se Laŭ tiam estus droninta . . . certe li mem estus kulpa pri tio . . . kaj . . . ne estus estinta neeble . . . kion li estus farinta tiam? Kaj se li, Jaĉjo, ankaŭ estus droninta! Tio ja ne estus neebla. Se li estus malleviĝinta en tiun profundan, malhelan akvon, kaj se li estus forglitinta sub la fortikan glacieron, kaj se li tiam ne estus povinta trovi la truon por refoje grimpi sur la glacieron. Brr! Tiam li estus devinta resti en la mallumo; tiam li ne plu estus povinta vidi siajn amikojn, tiam li ne estus povinta spiri . . . tiam li estus devinta morti en tiu profunda, nigra akvo . . . Brr! Jaĉjo timtremis kaj tordis

Iam Jaĉjo vidis ankaŭ Tomon fari angorajn grimacojn, nome tiun vesperon, kiam ili triope foriris por remi, kaj kiam Tom pendis de la ponteto; . . . kaj ankaŭ la katon de mastro G. li vidis iam tiel timigita, kiam li ĝin trovis en la arbustaro; sed la rigardado de Laŭ estis plej terura . . . Se Laŭ tiam estus droninta . . . , certe, li mem kulpus pri tio kaj sendube tio povis okazi . . . Kaj tiam? Kaj se ankaŭ li, Jaĉjo, estus droninta! Ankaŭ tio ja povis okazi. Se li estus tute malaperinta en tiu malluma profundaĵo kaj glitinta sub la fortikan glacieron, ne povante plu trovi la truon por ellevi sin. Brr, tiam li devus resti en tiu mallumo; li ne revidus siajn amikojn; ne povante plu spiri, li mortus en tiu profunda nigraĵo Brrr!

sin iom supren de sub la kovri-
loj, por vidi la lumon. Estis su-
fokete nun sub tiu dika ŝarĝaĵo,
aŭ — ĉu eble la angoro pro tio,
kio estus povinta okazi, igis lin
serĉi aeron kaj lumon?

Se li nun estus droninta . . . tiam
. . . tiam . . . „La Sinjoro ŝirmis
vin, mia knabo . . . Kiel malbone
tio estus povinta finiĝi. Nia ka-
ra Sinjoro savis vin!“ diris lia
patrino antaŭ kelkaj minutoj,
kiam ŝi agrable kovris lin per la
litkovriiloj.

14. Mi provis juĝi la personon, al
kiu mi klopodis vendi kaj adap-
tis miajn vortojn laŭ mia juĝo pri
la persono.

Jaĉjo timtremis, leve tordante
sin el sub la likovriiloj por vidi
la lumon. Estis sufoke sub la
densa kovraĵo; ĉu eble la angoro
pri tio, kio povus esti okazinta,
igis lin serĉi aeron kaj lumon?

Se li ja estus droninta . . . Tiam
. . . tiam . . . „Disinjoro protektis
vin, mia knabo . . . Kiel malbone
povus fariĝi al vi! La kara Dio
vin savis!“ ĵus diris lia patrino,
kiam ŝi agrable kovris lin per la
litkovriiloj.

(*juĝ'* — *persono*): Mi provis ju-
ĝi la personon, al kiu mi klopod-
is vendi kaj laŭ tio mi adaptis
miajn vortojn.

Rimarkoj ĉe:

1. (*liaj-siaj*): En la lingvo de la originalo la posedaj pronomoj estas unusilabaj pro kio ili ne akcentiĝas kaj preskaŭ kunfandiĝas kun la sekvanta vorto. En Esperanto ili ricevas iom da akcento, ĉar ili estas dusilabaj kaj ne kunfandiĝas kun la vorto sekvanta. Tial ni kelkfoje anstataŭigis tiujn vortojn per *la*, kiu vorto modeste sin tenas malantaŭe.
3. (*returne*): La duan *returne* ni povas forlasi, ĉar la ideo estas jam sufiĉe esprimita en la unua.
7. (*ambaŭ*): Aliaj solvoj: a) la dua „*ambaŭ*“ povas esti anstataŭigata per „*ili*“, kiu vorto sonas pli malpeze: „... kaj baldaŭ ili ruliĝis sur la vojo“; b) Ankaŭ „*ili*“ povas malaperi: „Tiam la knaboj kaptis unu la alian kaj baldaŭ ruliĝis sur vojo.“
8. (*esti permesate*): En la verko, el kiu ni prenis la koncernajn frazojn, ili ne tuj sekvas unu la alian, sed staras sur unu sola paĝo, do kun tro malgranda spaco inter si. Kvankam la traduko „esti permesate“ precize esprimas la ideon, ĝi tamen faras tion tro longforme kaj pro tio tro peze kaj altrude, kontraŭe al la ekvivalentoj en diversaj lingvoj naciaj. Pro tio oni jam ofte serĉis alian formon kaj proponis „rajti“ kaj la neologismojn „darfi“, „lici“ kaj „smeji“ resp. el la germana, angla-franca kaj slava lingvoj. „Rajti“ povas bone servi kaj jam estas ofte uzata, sed en la ĉi supraj frazoj n. o. ne kontentigas. Pri „darfi“, „lici“ kaj

„smeji“ oni multe skribis, sed la vortoj ne ricevis civitanan rajton.

Sed kial ni ne uzu la manieron de Zamenhof por esprimi tiun ideon? Li uzis „povi“ por *esti permesata* kaj „ne devi“ por *ne esti permesata*. Ekz. „Ĝi estis saĝa virino, sed tre fiera je sia nobleco; tial ŝi portis dek du ostrojn sur sia vosto, dum aliaj noblecoj *ne devis porti* pli ol ses.“ (F. A. I. p. 51).

„La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de l' artikolo, *povas* en la unua tempo *ne uzi* ĝin, ĉar ĝi estas oportuna, sed ne necesa.“ (Ekzercaro par. 27.)

„... ĝin ĉagrenis tio, ke ĝi *ne devis resti* en sia lito.“ (F. A. I. p. 20.)

„Ni *povas* diri: „pardoni la malamikon“, sed ni devas diri: „pardoni al la malamiko lian kulpon“ (Ekzercaro par. 29.)

„Ili *ne devis* lasi rimarki, ke ili nenion vidas.“ (F. K. I. p. 71.) Anstataŭ la longan formon „*esti permesate*“, ni preferas en la menciitaj frazoj la manieron de Zamenhof, variigitan per „*permesi*.“

10. (*estis -inta*): Sen malutilo ni povas en preskaŭ ĉiuj tiuj frazoj anstataŭigi tiun formon per la simpla *-is*, kiel agis Kabe en „La Faraono“. La kunteksto preskaŭ ĉiam montras la ĝustan signifon. Nur en la lasta frazo ni ne ŝanĝis *estis savinta*, ĉar *savis* estas miskompreniga: Ĉu Jaĉjo *savis* la valizon, kiam ili venis sur la Soŝeon, aŭ ĉu li estas *savinta* ĝin dum la forkuro?

C. Altaj ripetiĝoj.

Sinsckvajn frazojn oni ne finu per la samaj aŭ similonaj vortoj aŭ per la sama ritmo.

A

Ne tiel

1. Fraŭlino B. estis zorgoplena kaj afabla al ŝi. Ŝi alportis manĝaĵon al ŝi, ĉar Trees nun ne povis zorgi pri tio, kaj vespere ŝi restis horeton kun ŝi.

B

. . . sed tiel ĉi.

Fraŭlino B. estis al ŝi zorgoplena kaj afabla. Ŝi alportis manĝaĵon, ĉar Trees nun ne povis zorgi pri tio, kaj vespere ŝi restis kun ŝi horeton.

En kolono A du frazoj finiĝas per la samaj vortoj (al ŝi), kaj ĉiuj frazoj finiĝas per la sama ritmo (al ŝi, al ŝi, kun ŝi). Tio sonas malbele. Donante al la koncernaj vortoj alian lokon, kie ilia ripetiĝo ne ricevas akcenton, kaj foriginte unu „al ŝi“ (ĉar la kunteksto estas sufiĉe klara), ni akiras pli kontentigan rezulton.

Klopodu ŝanĝi tiel la jenajn tekstojn en kolono A, sed antaŭe kovru kolonon B:

2. Mi pripensis, kiel sciigi vin, sen vundi vin.

(*vin—vin*): Mi pripensis, kiel vin sciigi, ne vundante vin.

3. Kio estas al vi, kial vi estas tiel ekscitita? li demandis, prenante ŝian manon. Ŝi kapneis, liberigante sian manon.

(*-ante sian manon, — -ante sian manon*): Kio estas al vi, kial vi estas tiel ekscitita? li demandis, prenante ŝian manon. La manon liberigante, ŝi skuis la kapon.

4. Mi ĉiam sendis lin por serĉi lin.

(*lin — lin*): Mi lin ĉiam sendis por serĉi lin.

5. Ĉiun fojon, kiam la plado estis malplena, la hundoj leke purigis ĝin. Poste oni denove plenigis ĝin.

(*igis ĝin — igis ĝin*): Ĉiun fojon, kiam la plado estis malplena, la hundoj leke purigis ĝin. Poste oni ĝin denove plenigis.

6. Kiam mi dungas laborantojn kaj instruas ilin, mi devas unue iom laŭdi ilin ĉe ĉiu progreso por kuraĝigi ilin.

(*ilin — ilin — ilin*): Kiam mi dungas laborantojn kaj ilin instruas, mi komence devas ĉe ĉiu progreso iom laŭdi tiujn homojn por kuraĝigi ilin.

7. Li povis rigardi ĉion kaj la kapitano precipe montris al li, kiel bone la maristoj purigas ĉion.

(*ĉion — ĉion*): Li povis rigardi ĉion, kaj la kapitano montris al li precipe, kiel bone la maristoj ĉion purigas.

8. Okazis foje, ke malriĉa knabo insultis lin, kiam li persekutis lin.

(*lin — lin*): Iam okazis, ke malriĉa knabo lin insultis, kiam li persekutis lin.

9. Se ŝi estus honeste dirinta, ke mankas mono al ŝi, ni senhezite estus donintaj anticipan pagon al ŝi.

(*al ŝi — al ŝi*): Se ŝi estus sincere dirinta, ke mankas al ŝi mono, ni senhezite estus donintaj al ŝi anticipan pagon.

10. Trees trenis la malbelan, nigran altan tableton antaŭ la fenestron, pendigis tukon sur ĝin, tiel ke ĝi estis preskaŭ tute kovrita kaj tiam ŝi lokis florojn sur ĝin.

(*sur ĝin — sur ĝin*): Trees trenis la malbelan, nigran, altan tableton antaŭ la fenestron, preskaŭ tute kovris ĝin per tuko kaj lokis sur ĝin florojn.

11. Ili konstruis por si kabanon el pecoj de neĝo; la truojn ili ŝtopis per neĝo. (*neĝo* --- *neĝo*): Ili konstruis por si kabanon el pecoj de neĝo. Per neĝo ili ankaŭ ŝtopis la truojn.
12. Li klinis sin super ŝin, atente observante ŝin. (*sin* — *ŝin* — *ŝin*): Li sin klinis super ŝin kaj atente ŝin observis.

ĉ. Rimoj:

Same malbele sonas ankaŭ hazardaj rimoj kaj rimoidoj.

Iam ni fiksis por la konata verko de Degenkamp jenan titolon: „Kon-silanto pri la gramatiko de Esperanto“. En la presprovaĵo ni ĝustatempe rimarkis la rimon. Per malgranda ŝanĝo ni korektis tion en: „Kon-silanto pri la Esperanta gramatiko“.

Kovru kolonon B kaj klopodu eviti la rimojn en kolono A:

A

Ne tiel

1. Mi citos al vi, kion li diris al mi.

2. La loĝado en la mansardo, vin-tre, printempe kaj aŭtune tiel gaje suna, iĝis sufero en la mezo de l' somero.

3. Mi ŝatis la laboron kaj lernis dum mi vendis.

4. Li ne haltis ĉe li, sed preterpasis lin. Dum momento mi pensis, ke Luigi miskomprenis min.

5. Dum momento tio trankviligis lin, sed tuj poste li sentis, ke li ne plu kredas ĝin.

6. Per tremantaj manoj ŝi kuŝigis la infanon. Li kaptis ŝian manon: „Trecs . . .“

7. Li parolis tre dialekte, kaj post prezentiĝo li diris rekte

B

. . . sed tiel ĉi.

(*al vi* — *mi*): Mi citos, kion li rakontis al mi.

(*sufero* — *somero*): La loĝado en la mansardo, vintre, printempe kaj aŭtune tiel gaje suna, iĝis turmento en la mezo de l' somero.

(*lernis* — *vendis*): Mi ŝatis la laboron kaj lernis vendante.

(*lin* — *min*): Li ne haltis ĉe li, sed lin preterpasis. Dum momento mi pensis, ke Luigi miskomprenis min.

(*lin* — *ĝin*): Dum momento tio trankviligis lin, sed tuj poste li sentis, ke li ĝin ne plu kredas.

(*infanon* — *manon*): Per tremantaj manoj ŝi kuŝigis la infanon. „Trecs“, li diris, ŝian manon prenante.

(*dialekte* — *rekte*): Li parolis tre dialekte kaj post prezentiĝo (li) rekte diris

8. „Ĉesu momenton“, grumblis Jaĉjo, baraktante sin levante. (*baraktante — levante*): „Ĉesu por momento!“ grumblis Jaĉjo, barakte levante sin.
9. Iom suspekteme mi iris al li. Li diris al mi . . . (*iris al li — diris al mi*): Iom suspekte mi aliris lin. Li diris al mi
10. Mia brako preskaŭ memstare leviĝis por tuŝi ŝin, sed mi detenis ĝin. (*ŝin — ĝin*): Mia brako preskaŭ memstare leviĝis por tuŝi ŝin, sed mi ĝin detenis.
11. Se vi scius, kiel danka mi estas al vi, pro tio, ke vi venis por diri tion al mi. (*al vi — al mi*): Se vi scius, kiel danka mi estas al vi pro tio, ke vi venis por diri tion.

Oni evitu ankaŭ komenci kelkajn sinsekvajn frazojn per la samaj aŭ similsonaj vortoj, ekz.:

- | | |
|--|--|
| S. A. T. eldonas ĉiumonatan gazeton „Sennaciulo“ kaj ĉiujare jarlibron kun la adresoj de la membroj. | S. A. T. eldonas ĉiumonatan gazeton „Sennaciulo“ kaj ĉiujare jarlibron kun la adresoj de la membroj. |
| S. A. T. havas ĉiujare sian kongreson. | Ĝi havas en ĉiu jaro sian kongreson. |

Ĉar la unua frazo komenciĝas per „S. A. T.“, oni komencu la duan per „Ĝi“.

Laŭ ebloj kiuj prezentiĝas por tio, oni povas eviti malbele sonantajn ripetiĝojn kaj rimojn:

- donante al la koncernaj vortoj alian lokon, kie ili ne ricevas akcenton;
- anstataŭigante ilin per sinonimoj;
- forigante ilin.

La sekvanta tasko nun verŝajne ne prezentas gravajn malfacilaĵojn:

A

Ne tiel

- La ĉefo eniris kaj diris
- Ĉiuj skatoloj enhavis la saman enhavon.

B

. . . sed tiel ĉi.

- (*iris — diris*): La ĉefo eniris dirante . . . ; aŭ: Enirinte la ĉefo diris
- (*enhav- — enhav'*): Ĉiuj skatoloj enhavis la samon.

3. La knabino volis rezonadi kun plenaĝuloj, kvazaŭ ili estus ŝiaj samaĝuloj.

(*aĝuloj* -- *aĝuloj*): La knabino volis rezonadi kun maturaj homoj, kvazaŭ ili estus ŝiaj samaĝuloj.

4. Esperanto estas la plej bela invento de nia jarcento.

(*invento* -- *jarcento*): Esperanto estas la plej bela eltrovaĵo de nia jarcento.

5. Dum momento regis silento.

(*momento* -- *silento*): Kelkajn sekundojn regis silento.

6. Malpezaj paŝoj sonis antaŭ la dometo kaj oni laŭte frapis la pordon. La kamparano iris por malfermi la pordon.

(*pordon* -- *pordon*): Malpezaj paŝoj sonis antaŭ la dometo kaj oni laŭte frapis la pordon. La kamparano iris por malfermi.

7. Hendriko pasigis la nokton en gastejo, kiu troviĝis ĉe la legomvendejo, kontraŭ la preĝejo.

(*ejo*, *-ejo*, *-ejo*): Hendriko pasigis la nokton en hotelo, kiu troviĝis ĉe la vendejo de legomoj kontraŭ la preĝejo.

8. Li severe riproĉis nin pri nia konduto ĝenerale kaj pri la mia speciale.

(*ĝenerale* -- *speciale*): Li severe riproĉis nin pro nia konduto ĝenerale kaj pri la mia precipe.

9. Benjo kaj Sonjo amis unu la alian. Jam de sia infanaĝo ili konis unu la alian.

(*unu la alian* -- *unu la alian*): Benjo kaj Sonjo reciproke sin amis. Jam de sia infanaĝo ili konis unu la alian.

10. La tuta afero estas profunda mistero.

(*afero* -- *mistero*): La tuta afero estas granda enigmo.

11. La lasta adorinto foriris, poste la pastro kaj la orgenisto kaj fine la sakristiano, ferminte la pordon, foriris.

(*foriris* -- *foriris*): La lasta adorinto foriris, poste la pastro kaj la orgenisto kaj fine, ferminte la pordon, la sakristiano.

12. La scivolo rekompenciĝos, ĉar la libro enhavas vere interesajn novelojn, ĉar la aŭtoro pruviĝis talenta verkisto.

(*ĉar* -- *ĉar*): La scivolo rekompenciĝos, ĉar la libro enhavas vere interesajn novelojn, per kiuj la aŭtoro pruvis esti talenta verkisto.

13. Kiam li eniris, li intencis senvestiĝi, sed pensante pri la revestiĝo kaj la relaviĝo, kaj pro tio, ke li devos denove baniĝi, li decidis, ke ne, sed ke li dormos en brakseĝo. (*-iĝi, -iĝi, -iĝo, -iĝo, -iĝi*): Kiam li eniris, li intencis demeti la vestojn kaj denove enlitiĝi, sed pensante pri tio, ke li devos ree vesti, lavi kaj bani sin, li decidis ne fari tion, sed dormi en brakseĝo.
14. La kraneto troviĝas en la koridoreto, kiu kondukas al la korteto. (*et, -et, -et*): La krano troviĝas en la koridoro, kiu kondukas al la korto.
15. Atinginte la supron de la monteto, li rigardis de supre al la vilaĝo. (*supron — supre*): Atinginte la supron de la monteto, li rigardis al la vilaĝo (situanta) sub li.
16. La dolĉaj sonoj alproksimiĝis kaj baldaŭ la boato, en kiu ili produktiĝis, alflankiĝis. (*iĝis, iĝis, -iĝis*): La dolĉaj sonoj venis proksimen kaj baldaŭ la boato, en kiu oni faris ilin, alflankiĝis.
17. Li ne ploris plu, kaj fikse rigardis antaŭ sin, malrapide irante plu. La malgajaj sulkoj super liaj okuloj estis pli profundaj kaj ne malaperis plu. (*plu — plu*): Li ĉesis plori kaj fikse rigardis antaŭ sin, malrapide irante plue. La malgajaj sulkoj super liaj okuloj estis pli profundaj kaj ne malaperis.
18. Li sin turnis kaj iris returne. (*turni — returne*): Li sin turnis kaj reiris; aŭ: Turninte sin, li reiris.
19. Kiom simpla estus la afero, se la knabinoj sciis la destinon de la jahto. Nun ili devis fidi la hazardon kaj nur povis sekvi ĉiujn movojn de la jahto. (*jahto — jahto*): Kiom simpla estus la afero, se la knabinoj sciis la destinon de la jahto. Nun ili devis fidi la hazardon kaj nur povis sekvi la movojn de la ŝipo (aŭ: nur povis sekvi ĝiajn movojn).
20. Johano per tremantaj manoj helpis denove volvi la malligitan ŝnureton ĉirkaŭ la kruretojn de la kuniklito. (*-eton, -etojn, -eto*): Johano per tremantaj manoj helpis volvi denove la malligitan ŝnuron ĉirkaŭ la kruojn de la kuniklito.
21. Aŭdiĝis nelaŭta bruo kaj daŭre la kano susuris. Tiam paroliĝis. Estis kvzaŭ ŝi estis transdo- (*-iĝis, -iĝis, -iĝis, -iĝis, -iĝis*): Aŭdiĝis nelaŭta bruo kaj la kano daŭre susuris. Tiam oni ekparol-

nata al alia viro. Denove sonis bruo; tiam silentiĝis. Ŝi sentis sin metata sur la piedoj. Forpreniĝis la tuko de sia kapo. Lanterno moviĝis ire kaj revene.

22. Li lasis ŝin sola, transpaŝis la ferdekon kaj iris al la kajuto meze de la ferdeko.

23. Nur kiam jam tagiĝis, la vetero retransviliĝis kaj la dormo, kvankam mallonga, ŝin refreŝigis.

24. Ŝajnis al mi, kvazaŭ rigardo profunda kaj silenta rigardis sur min.

25. Ĉu vi donos la ordonojn pri la tagmanĝo por dimanĉo?

26. Verda lacerto moviĝeme sin movis tien kaj reen, je granda indigno de la du bufoj.

27. Malgranda infano vestita per nigra kufeto ĉirkaŭita de nigra punteto sur la kapo kaj kun nigra vizaĝeto, sin amuzis per kukurbo kaj amaseto da ŝeloj de terpomoj.

28. Dum la kongreso okazos fakaj kunsidoj, kie oni povas diskuti fakajn aferojn kun alilandaj samfakuloj.

lis. Ŝajnis, ke ŝi estas transdonata al alia viro. Denove sonis bruo; poste silentiĝis. Ŝi sentis sin starigata. Oni forprenis la tukon de ŝia kapo. Svingiĝis lanterno.

(*ferdeko — ferdeko*): Li lasis ŝin sola kaj transpaŝante la ferdekon, li iris al la kajuto, kiu troviĝis meze de ĝi.

(*-iĝis, -iĝis, -iĝis*): Nur kiam jam tagiĝis, la vetero iĝis ree trankvila kaj la dormo, kvankam mallonga, refreŝigis ŝin.

(*rigardi — rigardi*): Al mi ŝajnis, ke rigardo profunda kaj silenta ripozis sur mi.

(*donos ordonojn*): Ĉu vi donos vian komisionojn por la dimanĉa tagmanĝo?

(*moviĝeme — movis*): Verda lacerto vigle moviĝis je granda indigno de la du bufoj.

(*-et, -et, -et, -et*): Malgranda infano vestita per nigra kufeto ĉirkaŭita per nigra punto sur la kapo kaj kun nigra vizaĝo sin amuzis per kukurbo kaj ŝeloj de terpomo.

(*fak', fak', fak'*): Dum la kongreso okazos fakaj kunsidoj, kie oni povos diskuti specialajn aferojn kun samfakuloj.

Rimarko pri 14, 20 kaj 27:

En kelkaj lingvoj oni volonte uzas diminutivojn, ankaŭ tie, kie ili ne estas necesaj. En tradukoj oni uzu ilin modere!

3. Bona stilo estas klara.

„En Esperanto la vortordo estas libera“, oni ofte diras. Eble vi tamen sulkigas la frunton, legante:

a. Kaj nian atingos ni celon.

b. Ĝi la homan tiras familion.

„Tiel oni ne parolas!“ vi diras, verŝajne indigne. Jen, pruvo, ke en Esperanto tamen ekzistas certa vortordo, de kiu la ordo en ĉi supraj frazoj devias. Ili, nome, estas prenitaj el poemoj de Zamenhof, en kiuj la ritmo kaj la rimo postulas tiun ordon. Pro tio Zamenhof uzis privilegion, kiun posedas nur poetoj por tiaj esceptaj kazoj.

Ĉar pri poezio ni ne intencas okupi nin, ni donas ekzemplon en prozo:

Mi aĉetis ion en butiko kaj pagis ĉe la kasejo:

„Tre mi dankas vin! diris la kasistino en mia gepatra lingvo.

„Fremdulino“, mi pensis, „kiu ankoraŭ ne regas la lingvon de ĉi tiu lando“.

Poste mi vizitis Zamenhofan vesperon de unu el niaj grupoj.

„Mi dankas vin tre!“ diris la kasisto, al kiu mi pagis mian enirbileton.

„Komencanto“, mi pensis. „Li ankoraŭ ne regas Esperanton.“

Kial mi pensis, ke la unua estas fremdulino kaj la alia — komencanta esperantisto? Nu, ĉar ĉiu el ili uzis vortordon de sia gepatra lingvo. En la lingvo de mia lando oni diras ne: „Tre mi dankas vin!“ sed: „Mi dankas vin tre!“ Kaj en Esperanto oni diras ne: „Mi dankas vin tre!“ sed: „Mi tre dankas vin!“

Jen do alia pruvo, ke en Esperanto ekzistas ia vortordo. Tiun vortordon oni nomas la konvencia vortordo.

a. Konvencia vortordo.

Klarecon, facilan komprenon, oni akiras ĉefe, obeante la konvencion, t. e. la kutimojn pri vortordo kaj esprimmaniero.

La sekvantaj tekstoj en kolono A eble ne vekos vian indignon, sed la sulko sur via frunto verŝajne restos:

A

Ne tiel

1. Mia filino mortis kaj al mi postlasis nepinon.

2. Tie lia patrino la naskiĝon de tiu ĉi unua kaj lasta infano atendis.

B

. . . sed tiel ĉi.

Mia filino mortis kaj postlasis al mi nepinon.

Tie lia patrino atendis la naskiĝon de tiu ĉi unua kaj lasta infano.

3. La letero al li estis voĉe legata. La letero estis voĉlegata al li.
4. (Telefona) Ĉu ankoraŭ vi min aŭdas? Ĉu vi ankoraŭ aŭdas min? aŭ: Ĉu vi min ankoraŭ aŭdas?
5. Estis en la oazo de Chargeb, kie li sian junan edzinon unuafoje renkontis. Estis en la oazo de Chargeb, kie li unuafoje renkontis sian junan edzinon.
6. Per ŝipo kun ŝi revenu. Per ŝipo revenu kun ŝi, aŭ: Revenu kun ŝi per ŝipo.
7. Mi de vi postulas, ke vi ne parolu pri tio, kion mi ĵus al vi komisiis. Mi postulas, ke vi ne parolu pri tio, kion mi ĵus komisiis al vi.
8. Venu, mia nepino kaj mi al vi donos brakon. Venu, mia nepino kaj mi donos al vi brakon.
9. Ŝi palpserĉis ŝlosilon, kiu per ĉeneto ĉirkaŭ ŝia talio estis fiksita. Ŝi palpserĉis ŝlosilon, kiu per ĉeneto estis fiksita ĉirkaŭ ŝia talio; aŭ: . . . kiu estis fiksita per ĉeneto ĉirkaŭ ŝia talio; aŭ: . . . per ĉeneto fiksitan ĉirkaŭ ŝia talio.
10. Mi por vi estis obstaklo, kiu al vi, malebligis serĉi pli bonan estontecon. Mi estis por vi obstaklo, kiu malebligis al vi serĉi bonan estontecon.
11. La Ĉiopova al mi tion sendis kiel konsolon. La Ĉiopova sendis tion al mi kiel konsolon.
12. Mi pri tio al ŝi petos. Mi petos ŝin pri tio; aŭ: Mi petos al ŝi pri tio; aŭ: Mi ŝin petos pri tio.
13. Ŝi mirigite la knabinon alrigardis. Mirigite ŝi rigardis la kabinon.
14. Virino, kiu pro kompato mian avon kaj min gastigis en sia domo. Virino, kiu pro kompato gastigis min kaj mian avon en sia domo.
15. Kian malbonon ŝi al mi povus fari? Kian malbonon ŝi povus fari al mi?
16. Mi estas certa, ke tio la fraŭlinon belege vestos. Mi estas certa, ke tio belege vestos la fraŭlinon; aŭ: ke tio vestos la fraŭlinon belege.

17. Tion iam al ŝi diris la avo. Tion la avo iam diris al ŝi.
18. Tiam mia edzo venis por al mi rakonti, ke li vin trovis. Tiam mia edzo venis por rakonti al mi, ke li trovis vin; aŭ: ke li vin trovis.
19. Ni al vi havigos freŝan banon. Ni havigos al vi freŝan banon.
20. Ofte ŝi tie estis por kun sia avo aĉetprezenti la tuketojn. Ofte ŝi estis tie por vende prezenti kun sia avo la tuketojn.
21. Mi hieraŭnokte tre longe devis labori. Hieraŭnokte mi devis labori tre longe.
22. Mi tion al vi povus pruvi. Mi povus pruvi tion al vi; aŭ: Mi povus tion pruvi al vi; aŭ: Mi tion povus pruvi al vi.
23. Alia infano samaĝa kiel frenezulino estus krieginta. Alia infano samaĝa estus krieginta kiel frenezulino.
24. Tion vi de mi ricevos donace. Tion vi ricevos de mi donace.
25. Li tuj foriris al la urbocentro por tie en la grandaj trinkejoj, muzikejoj kaj la dancejoj esplorrigardi. Li tuj foriris al la centro de la urbo por tie esplorrigardi en la grandaj trinkejoj, muziksalonoj kaj dancejoj.
26. Mian vivon mi por la infano riskis. Mian vivon mi riskis por la infano; aŭ: Mi riskis por la infano mian vivon; aŭ: Por la infano mi riskis mian vivon.
27. Vi aspektu, kvazaŭ vi la monon, kiun li rekompenca al vi donos, forte bezonas. Vi aspektu, kvazaŭ vi forte bezonas la monon, kiun li rekompenca donos al vi; aŭ: kiun li donos al vi rekompenca.
28. Mi vidis, ke vi monon al ŝi donis. Mi vidis, ke vi donis al ŝi monon.
29. Ĉu vi do ne kompatas malriĉan maljunulinon, kiu estas tro malforta por labori kaj kiu tamen vivi devas? Ĉu vi do ne kompatas malriĉan maljunulinon, kiu estas tro malforta por labori kaj kiu tamen devas vivi?
30. Taksio kondukis la kvinopon al la hotelo, kie C. vastan ĉambron estis rezervinta. Taksio kondukis la kvinopon al la hotelo, kie C. estis rezervinta vastan ĉambron.

31. Tre miris li, ke tuj antaŭ la hotelo lin alparolis juna bedueno. Li tre miris, ke tuj antaŭ la hotelo alparolis lin juna bedueno; aŭ: . . . juna bedueno alparolis lin.
32. La cirkonstancoj, en kiuj li kun ŝi konatiĝis, envolvis ŝin en tre romantikan sferon. La cirkonstancoj, en kiuj li konatiĝis kun ŝi, volvis ŝin en tre romantikan sferon.

Rimarkoj.

Kvankam la vortordo en ĉi supraj frazoj estas iom alia ol tiu, al kiu ni kutimiĝis, oni ne povas nomi ĝin nepre erara. En certaj kazoj — kiel ni vidis ĉi antaŭe — ĝi eĉ povas esti necesa. Sed se tuta libro 200-paĝa, el kiu ni citis tiujn frazojn, estas tiel verkita sen unu neceso, tia stilo impresas nenatura kaj eĉ efikas incite kaj ni prave diras: „Tiel oni ne parolas!“ La tradukinto de tiu libro evidente volis krei propran stilon. Sed persona stilo estas tiom forte ligita al la karaktero de ĝia uzanto, ke oni ne povas krei ĝin. Persona stilo ne estas krebla, sed kreiĝas!

La kutima vortordo estas: subjekto, predikato, komplemento(j), laŭ la ordinara irado de la pensoj, ekz.:

La patro skribas en la ĝardeno leteron al sia filo.

Estas dezirinde, ke ĉiu elemento de la frazo staru apud tiu, al kiu ĝi rilatas. Oni do ne diru:

La patro skribas leteron al sia filo en la ĝardeno, ĉar tia aranĝo estas miskompreniga: oni pensas, ke la filo troviĝas en la ĝardeno.

Pro stilaj, nuancaj kaj akcentaj motivoj oni povas, ofte eĉ devas ŝanĝi tiun ordon, sed oni ĉiam zorgu, ke la rezultato havu la celitan sencan kaj ke la signifo ne ŝanĝiĝu. Pri tio poste.

b. Deviga vortordo.

En iu Esperanto-grupo trafis nin jenaj vortoj skribitaj sur nigra tabulo:

Ĉi tie oni nur parolu Esperanton.

„Ĉu ne estas permesite kanti tie ĉi?“ mi demandis la prezidanton, supozante, ke kantado eble ĝenus la najbarojn.

„Ni certe rajtas kanti en nia kunvenejo“, li respondis, „kial ne? Per kantado ni ĉiam komencas niajn vesperojn. Kial vi demandas?“

„Pro tiu frazo sur la nigra tabulo.“

„Tio estas instigo paroli ĉiam Esperanton“, li diris. „Vi scias, ke

ordinare oni post kelka tempo refalas en sian nacian lingvon. Tiu-
kaze ni atentigas la pekinton pri la frazo sur la nigra tabulo.“

„Mi komprenas. Via intenco estas bona, sed . . . tion vi ne esprimas
per tiu frazo!“

„Mi ne komprenas . . .“

„Vi ja volas instigi la membrojn, ke ili parolu nur Esperanton,
ĉu ne?“

„Jes.“

„Nu, tie staras io alia, nome: „Ĉi tie oni nur parolu Esperanton“,
t. e. ne kantu, ne legu aŭ ne skribu Esperanton. Ĉu vi nun kompre-
nas?“

„J-e-es . . .“

„Sed vi volis diri: „Ĉi tie oni parolu nur Esperanton.“

„Vi pravas, vere. Mi ĉiam opiniis, ke la vortordo estas libera, sed
nun evidentiĝas al mi, ke mi eraris.“

„Nu, mi ne volas diri, ke ĝi tute ne estas libera, sed almenaŭ ne
tute . . .“

Efektive, en ĝenerala senco la vortordo estas libera, sed tio ne sig-
nifas, ke oni rajtas aranĝi la vortojn arbitre. Estas vere, ke kon-
cerne distingon inter subjekto kaj objekto la frazoj:

Johano amas Marion, kaj

Marion amas Johano

ne povas kaŭzi miskomprenon; ambaŭ signifas la samon. Sed tiaj
ekzemploj servas ordinare kiel klarigo pri la utilo de la akuzativa
formo, per kiu oni povas distingi la anton de la ato. En diversaj
lingvoj oni distingas ilin per la vortordo; en tiuj lingvoj la frazo
Johano amas Mario signifas: *Johano amas Marion*.

Ankaŭ en Esperanto la kutima vortordo estas uzata, ĉu por akiri
pli bonan stilon — vidu la antaŭan ĉapitron — ĉu por reliefigi aŭ
akcenti iun vorton aŭ frazparton kaj tiel krei nuancon en la sig-
nifo de la frazo. Pri tio poste.

Nune ni volas paroli pri la loko, kiun iuj vortoj *devas* okupi en la
frazo, pro tio, ke sur alia loko ili donus al la frazo alian sencon ol
tiun, kiun ni celas. Klara ekzemplo pri tio estas la frazo: *Ĉi tie oni
nur parolu Esperanton*. Ĝi estas senerara, sed ne esprimas tion, kion
la prezidanto volis diri.

Ankaŭ la vortoj *ankaŭ*, *ankoraŭ*, *eĉ*, *jam*, *nur* kaj kelkaj aliaj staru
antaŭ la vortoj, aŭ la vortgrupo, al kiu ili rilatas. De tiu loko de-
pendas — kiel ni jam konstatis — la signifo de la frazo.

La temo, kiun ni nun komencis pritrakti, ne estas tute nova por ni.
Jam en la elementa lernolibro ni lernis, ke la vorto *ne* devas stari
tuj antaŭ la vorto aŭ vortgrupo, kiun ĝi neas, ekz.:

1. A. Mi tute ne komprenas tion.
B. Mi ne tute komprenas tion.
2. A. Mi ne renkontis lin.
B. Mi renkontis ne lin, sed lian fraton.
3. A. Tiu artikolo ne aperis en „La Progresanto“.
B. Tiu artikolo aperis ne en „La Progresanto“, sed en „Laborista Esperantisto“.
4. A. La patro ne legas libron, sed skribas leteron.
B. La patro legas ne libron, sed gazeton.

Oni do ne diru:

1. Mi ne renkontis lin, sed lian fraton.
2. Tiu artikolo ne aperis en „La Progresanto“, sed en „Laborista Esperantisto“.
3. La patro ne legas libron, sed gazeton,

ĉar la verboj *renkonti*, *aperi* kaj *legi* ankoraŭ devas servi por resp. *lian fraton*, *en Laborista Esperantisto* kaj *gazeton*.

Atentu tion ankaŭ en jenaj frazoj:

1. Je dimanĉo oni devas ne labori, sed ripozi. (Ne diru: ne devas, ĉar oni efektive devas fari ion, nome ripozi.)
2. Ne mi mensogis, sed vi!
3. Ne bele li parolis, sed klare.
4. Mi legis ne la dikan, sed la maldikan libron.
5. La leteron skribis ne mia patro, sed mia patrino.
6. Ne ĉio, kio brilas, estas oro.
7. Pri tio kulpas ne mi, sed ŝi.
8. Tiu ĉapelo apartenas ne al mi, sed al Karlo.
9. Vi ne diru tion!
10. Vi diru ne tion!
11. Ne vi diru tion!
12. Ne tute bona.
13. Tute ne bona.

Ekzemploj de Zamenhof:

1. Lernolibron oni devas ne tralegi, sed tralerni.
2. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra) povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas utila, sed ne necesa.

3. Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam la nominativon. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj.

Jen sekvas frazoj, kiuj pro la malĝusta loko de la ĉi supre menciitaj vortoj ricevis alian signifon ol tiun, kiun celis la aŭtoro de la originalo. Ni ĉerpis ilin el la sama verko, kiun ni aludis sur p. 23—26.

En kolono A ni donas post ĉiu frazo inter krampoj la — nedeziritan — signifon.

En kolono B la frazon korektitan laŭ la senco de la originalo.

A	B
Ne tiel sed tiel ĉi.
1. La najbaroj ne sin okupu pri la vizito. (Do: ili okupu aliajn personojn pri la vizito; ne sin.)	La najbaroj ne okupu sin pri la vizito.
2. Tia solvo tamen ne al ŝi malplaĉis. (Do, al kiu malplaĉis tia solvo, se ne al ŝi?)	Tia solvo tamen ne malplaĉis al ŝi.
3. Ne ŝin ĝenu, patro! (Do, kiun la patro ĝenu?)	Ne ĝenu ŝin, patro!
4. Ne tion forgesu! (Do forgesu ion alian, ne tion!)	Ne forgesu tion!
5. Ni ne pri tio silentu! (Do pri aliaj aferoj ni silentu, ne pri tio.)	Ni ne silentu pri tio!
6. Vi ne tion faru! (Do, kion mi faru?)	Vi ne faru tion!
7. Tiu bato tamen ne al ŝi sufiĉis. (Tiu bato sufiĉis al alia persono, ne al ŝi.)	Tiu bato tamen ne sufiĉis al ŝi.
8. Vi verŝajne ne tion povas kredi. (Vi verŝajne povas kredi aliajn aferojn; ne tion.)	Vi verŝajne ne povas kredi tion.
9. Ŝi ne sin movis. (Ŝi movis iun alian, ne sin.)	Ŝi ne movis sin.
10. Kontraŭstaro absolute ne vin helpos. (Kontraŭstaro helpos alian personon, ne vin.)	Kontraŭstaro absolute ne helpos vin.

11. Ĉi tiu ĉirkaŭo ne al ŝi konvenas. (Ĉi tiu ĉirkaŭo konvenas al alia persono, ne al ŝi.) Ĉi tiu ĉirkaŭ(aj)o ne konvenas al ŝi.
12. Mia filo ankaŭ ŝin konas. (Kiun mia filo konas krome?) Ankaŭ mia filo ŝin konas.
13. Via avo ankaŭ kuniru. (Kion la avo faru krome?) Ankaŭ via avo kuniru.
14. Se tiu Nubar kaj lia filino alvenis en tian kavernon kaj ankaŭ tie mortis . . . (Ĉu Nubar antaŭe mortis aliloke?) Se tiu Nubar kaj lia filino alvenis en tian kavernon kaj tie ankaŭ mortis . . .
15. Ĉi tiun jaron vi edziĝos kun Jane? Sed Johny ankaŭ ŝin atentatas! (Johny atentatas do ankaŭ alian knabinon!) Ankaŭ Johny ŝin atentatas.
16. Vi estu ruza kaj diru, ke vi ankaŭ tiel nomiĝas. (Vi nomiĝu do ne nur Jansen, sed ankaŭ Petersen.) Vi estu ruza kaj diru, ke ankaŭ vi portas tiun nomon.
17. Mi ankaŭ loĝis tie. (Mi ekz. ne nur laboris tie.) Ankaŭ mi loĝis tie.
18. La aliaj ankaŭ vidis ĝin. (La aliaj do ne nur aŭdis ĝin.) Ankaŭ la aliaj vidis ĝin.

Nun certe ne estas malfacile al vi, mem klarigi kial en la sekvantaj frazoj en kolono A la vortoj *almenaŭ, ankoraŭ, jam, eĉ, nur, tiel, ja* kaj aliaj ne staras sur la ĝusta loko, se la tradukinto volis redoni la signifon en kolono B:

19. Almenaŭ mi bezonas tri horojn. Mi bezonas almenaŭ tri horojn.
20. Mi nur havas dudek jarojn. Mi havas nur dudek jarojn.
21. Dum la transflugado li nur atentis sian maŝinon kaj sian kompason. Dum la transflugado li atentis nur siajn maŝinon kaj kompason.
22. Oni nur al mi komisiis konduki ŝin tien. Oni komisiis al mi nur konduki ŝin tien.

23. Nur varbu sanajn laboristojn. Varbu nur sanajn laboristojn.
24. Vi do ankoraŭ min konas? Vi do ankoraŭ konas min?
25. Ŝi iros al S-ino V. por petegi ŝin ankoraŭ atendi unu tagon. Ŝi iros al S-ino V. por petegi ŝin atendi ankoraŭ unu tagon.
26. Ĉu la sinjoro jam tion scias? Ĉu la sinjoro jam scias tion?
27. En Londono oni jam lin konsideris strangulo. Jam en Londono oni lin konsideris strangulo.
28. Ĉu vi eĉ al mi envias la panon? Ĉu vi eĉ la panon envias al mi?
29. Neniu eĉ lin vidis eksterdome. Eĉ neniu vidis lin eksterdome.
30. Li ja ŝin ne konas. Li ja ne konas ŝin.
31. De neniu el la knabinoj ŝi tiel publike estis ofendita. De neniu el la knabinoj ŝi estis publike tiel ofendita.
32. Prefere al mi diru, kien tiu sinjoro iris. Prefere diru al mi, kien tiu sinjoro iris.
33. Rememoru nur, kion la ebria G. preskaŭ al ŝi faris. Rememoru nur, kion la ebria G. preskaŭ faris al ŝi.
34. Antaŭe mi devas ion diri al vi. Mi devas antaŭe diri ion al vi.
35. La timo paralizis lin, ne pro la atako de tiu virino, sed pro la mistera potenco, kiu ŝajne de ŝi eliris. La timo paralizis lin, ne pro la atako de tiu virino, sed pro la mistera potenco, kiu ŝajne eliris de ŝi.
36. (El Esp. organo): Je la oka ĉiuj membroj preskaŭ ĉeestis. Je la oka preskaŭ ĉiuj membroj ĉeestis.

Sub influo de sia nacia lingvo oni ofte pekas en Esperanto kontraŭ la vortordo. Sed se ni metas la malĝustan frazon kontraŭ la ĝustan, tuj trafas nin, ke la lasta estas pli klara ol la unua, kiu fakte diras ion alian ol la aŭtoro volis diri.

Parolate la malĝusta frazo tamen povas doni la deziratan sencon per la tono, la „muziko“ de nia parolo. Ekz. kion signifas la frazo: Vin ankaŭ mi regalos?

La tono de nia voĉo povas doni al ĝi la deziratan signifon: Vin

ankaŭ — mi regalos (akcento sur: Vin ankaŭ). Ĉiu komprenos el tio: Ankaŭ vin mi regalos.

La skribita frazo vekas dubon, kiu ne ĉiam estas forigata de la kunteksto. Pripensu ankaŭ, ke, se la frazoj en kolono A devus esti komprenataj laŭ la signifo de la frazoj en kolono B, kiel oni do devus redoni la laŭvortan sencon de la frazoj en kolono A? Ekz. se al „Mi ankaŭ loĝis tie“ oni donas la signifon: „Ankaŭ mi loĝis tie“, kiel oni devus skribi, se oni efektive volas diri: Mi ankaŭ loĝis (do ekz. ne nur laboris) tie?

c. *Ŝanĝo de vortordo.*

La libero ŝanĝi la kutiman vortordon estas uzata — kiel ni menciis sur paĝo 26 ankaŭ por reliefigi aŭ akcenti iun vorton aŭ frazparton kaj tiel nuancon en la signifo de la frazo. La nuda fakto, kiun la frazo esprimas, ne ŝanĝiĝas per tio, sed aperas sub alia lumo, ekz. se mi volas demandi iun, ĉu li faris tion, kion mi komisiis al li, mi diras: „Ĉu vi faris tion?“ Se mi volas demandi, ĉu li aŭ iu alia faris tion, mi diras: „Ĉu *vi* faris tion?“ aŭ: „Ĉu faris tion *vi*?“ En la unua frazo mi devas akcenti „vi“. Tio ne estas necesa en la dua frazo, ĉar ni ŝovis la subjekton malantaŭen, do sur nekutiman lokon, kie la akcento per si mem falas sur „vi“.

En „Vivo de Zamenhof“ de Privat ni trovas multajn ekzemplojn de nekutima vortordo, el kiuj ni citas la jenajn:

1. Gloras generaloj, bruas tamburoj, sonas muzikoj.
2. Pli simpla, pli taŭga por uzado nuna devus esti la revita lingvo.
3. Nemultaj estas la lernantoj kaj neriĉa la paro.
4. Peza kaj dolora estis la ofero.
5. Bruas paŝoj kaj paroloj Brilas koloroj inter korboj kaj legomoj Disputas vendistinoj kun germana marĉandulo. Alkuras homoj. Arigiĝas vendemuloj.
6. Eksplodis milito. Amase falis junaj viroj. Funebriis la virinoj. Mizeris loĝantaro de vilaĝoj detruitaj.
7. Grandiĝis la infanaro kaj estis nesufiĉa la salajro.
8. Saĝa kaj severa estis la patro, viro skeptika je revoj, sed obstina je laboro.
9. De la patrino la koro, de la patro la cerbo, de la loko la impresoj; jen la tri ĉefelementoj en la formado de la Zamenhofa genio.
10. Pri laboristoj, pri malriĉaj homoj penantaj la tutan tagon, gimnaziano Zamenhof pensadis pli kaj pli.
11. Kiel ĉefon kaj animon de l' amuzoj, lin ĉirkaŭis gefratoj aŭ kolegoj.
12. Ĝojo granda, sed zorgo peza.

13. Alta la revo, granda la tasko.
14. Sur latva tero kvar gentoj malsamaj loĝadis en urboj kun celoj kontraŭaj, kun lingvoj diversaj, kun kredoj malamikaj.
15. Religian kredon li havis nur unu solan, nome la plej fidelan akuratecon al devo ĉiutaga.
16. Dolĉan anĝelan naturon havis la patrino.
17. Vivantajn vortojn lingvo devas havi, se ĝi celas vivi mem.

En ĉi tiuj frazoj ĉiu ŝanĝo de la kutima vortordo estas pravigebla en la stilo de ĉi tiu verko. Ne kaprice la aŭtoro aranĝis la vortojn alie! Li celis ion per tio:

Donante al certa vorto alian lokon ol la kutiman, li reliefigis aŭ akcentis ĝin. Tiel la frazo ricevis ian viglecon kaj koloron, kiuj plene konvenas al la temo, kaj kiuj ĉe normala vortordo mankas.

Legu en „Vivo de Zamenhof“ la cititajn frazojn en la kunteksto kaj poste aranĝu ilin laŭ la normala vortordo: tiam vi rimarkos, ke la ĉarmo, la aparta impreso, la reliefo, la akcento, la nuanco estas malaperintaj. La frazoj tiam impresas tro malvarme, afere, sobre, kvankam ilia fakta signifo ne ŝanĝiĝis.

Ekzistas diversaj kaŭzoj, kial alia vortordo ol la kutima estas preferinda. Tial „Plena Gramatiko“ avertas, ke „oni ne faru ŝanĝon senkaŭze, ĉar nur tiamaniere oni povas atingi, ke la ŝanĝo signifu ion, ke oni eksentu el ĝi certan nuancon: la akcentadon de iu frazelemento.“

Krome, ni vidis en tiu ĉi ĉapitro, ke senkaŭza ŝanĝado enhavas la danĝeron, ke oni diros ion alian ol kion oni volis diri.

4. Bona stilo estas simpla.

Por atingi klarecon oni aranĝu siajn frazojn en logika sinsekvo kaj evitu ĉirkaŭvojojn, detalecon kaj senutilan balaston. Sed aliflanke oni evitu ankaŭ troan koncizon, kiu ofte starigas la leganton antaŭ enigmojn. Klarigu tion kelkaj ekzemploj:

La kunmetaĵoj: vaporŝipo, abonpago, rapidvagonaro, bonkora, sciivola, altranga, bondeziroj, voĉdoni, piediri estas jam komune uzataj kaj pro tio tute klaraj. Sed legante la vorton *diadono* ni haltas: ĝi ŝajnas neologismo, sed vane ni serĉas ĝin en Plena Vortaro. El la enhavo de la verko, en kiu ni trovis ĝin, evidentiĝis, ke ĝi estas vorto kunmetita el *di* kaj *adono* = adono al dio. Sed skribante *di-adono* aŭ *adono al dio* ni faras la vorton tuj travidebla.

La vorto *mesmistero* estas same malklara. Laŭ la verko portanta tiun titolon, ni komprenis, ke ĝi signifas *mistero de la meso*. La traduko *mistero de la meso* estas pli klara kaj pli belsona. Ĉe eventuala ripeto povas sufiĉi *mes-mistero* aŭ *mesmistero*, ĉar tiam la ideo estas al la leganto jam konata.

En la Esperanto-literaturo oni renkontas plurajn ne tuj kompreneblajn kaj tro longajn kunmetaĵojn. Ili dankas sian naskiĝon al la naciaj lingvoj, kiuj havas por tiuj ideoj nur unu vorton — kunmetitan aŭ ne — kiun la aŭtoro aŭ tradukinto volis nepre esprimi same per unu vorto.

Disigo de la kunmetitaj partoj, aŭ streketo inter ili, povas fari tiujn vortojn pli flue kompreneblaj, ekz.:

A	B
Ne tiel sed tiel ĉi.
1. sekvinbero	seka vinbero
2. junitagoj	juniaj tagoj
3. glacikampbalaisto	glitkureja balaisto (poste en la verko: balaisto)
4. glitŝuligilo	glitŝua ligilo, aŭ: ligilo de glitŝuo
5. turnmalfermeblaj fenestroj	turne (aŭ porde) malfermeblaj fenestroj
6. lingvuzo	lingvouzo; lingvouzado
7. lingvekzercoj	lingvaj ekzercoj
8. petrolpendlampo	pendanta petrolo lampo; petrolo lampo, poste simple: lampo
9. ĝardenpiedvojo	ĝardena vojeto
10. merkredmatene	merkredon matene
11. lundposttagmeze	lundon posttagmeze
12. pavimmalpuraĵo	malpuraĵo de la pavimo

Ju pli simple ni esprimas nin, des pli facile oni nin komprenas. Frazo, kiun oni devas relegi por kompreni ĝin, ne estas bonstila, ĉar bona stilo neniam ĝenas la legadon, sed male, ĝin faciligas. Ankaŭ de parolanto ni atendas, ke li parolu klare kaj tuj kompreneble, ĉar malklaran frazon skribitan ni povas relegi, sed parolanton ni ne povas interrompi por peti, ke li rediru la lastan frazon!

Malbonan stilon oni renkontas pli ofte en tradukoj ol en originaloj. Tio estas evidenta, ĉar en originalo oni inklinas al plej simpla esprimo de la pensoj, sed dum tradukado oni spertas la influon de la originala teksto. La tradukanto ja volas sekvi la originalon kiel eble plej precize. Tio estas, kompreneble, laŭdinda, sed li ne malatentu, ke la enhavo konsistas ne nur el vortoj, kiujn li devas anstataŭigi per vortoj el alia lingvo, sed ankaŭ el sentoj, impresoj, emocioj, atmosfero, k. t. p., kiuj kune kolorigas kaj nuancas la vortojn, la tutan tekston kaj tiel elvokas en la leganto plenan bildon de tio, kion la aŭtoro volis diri. La traduko devas redoni tion. Por tion atingi, la tradukanto ofte devas iom flankeniĝi de la originalo, ĉar la esprimpovo, la esprimmaniero kaj la esprimforto en la diversaj lingvoj ne estas ĉiurilate egalaj. Por ke iu vorto aŭ teksto reliefigu, la tradukanto ne malofte devas modifi la tekston.

Por ilustrati tion, ni donas kelkajn ekzemplojn:

A

Ne tiel

Pro tio, ke Anĉjo la Ĉasisto neniam plendis pri ĉiuj tiuj malhelpantaj cirkonstancoj en la kvar elementoj, kiujn kelka nombro de ĉasistoj sole kulpigas, se iu venas hejmen kun malplena ĉasaĵujo, kaj ke li malofte fanfaronis pri leporoj kaj perdrikoj, kiujn li, kvankam ne hejmen portis, sed pri kiuj li estis konvinkita, ke ili nepre en iu netrovebla rifuĝejo mortis pro iliaj vundoj.

B

. . . sed tiel ĉi.

Pro tio Anĉjo la Ĉasisto neniam plendis pri la ĝenaj cirkonstancoj en la kvar elementoj, kiujn solajn kelkaj ĉasistoj kulpigas, kiam ili venas hejmen kun malplena ĉasosako. Tial li malofte fanfaronis pri leporoj kaj perdrikoj pri kiuj — kvankam li ne portis ilin hejmen — li tamen estis konvinkita, ke ili en netrovebla rifuĝejo mortis pro siaj vundoj.

- A. Longa kaj stranga frazo! La komencaj vortoj „Pro tio ke“ kaj iom poste „kaj ke“ igas nin scivolaj pri tio, kio okazis pro tio, ke Aĉjo la Ĉasisto neniam plendis k. t. p., sed tiu alplenigo ne sekvas kaj la pensoj anstataŭ iri rekte antaŭen, implikiĝas pro la malĝusta kombino *kvankam . . . sed*.

Esplorante la originalan tekston ni konstatas, ke la tradukinto sin lasis gvidi de sia gepatra lingvo.

Ĉar la frazo estis tro longa, ni hakis ĝin en du partojn. Pro tio la vortoj „Pro tio“ devus esti ripetataj. Sed ĉar tia ripeto sonas malbele, ni skribis „tial“: „Tial li malofte fanfaronis . . .“ k. t. p. Malgraŭ tio la frazo ne estas kontentiga. La originalo ja estas verkita

en stilo, kiun oni nuntempe ĝenerale ne uzas. Pri tiaj stilistoj la nederlanda lingvisto Prof-o Gerlach Royen O. F. M. diras:

„Ekzistas aŭtoroj, kiuj kun plezuro skribas frazon du paĝojn longan. Oni povas diri, ke tio estas respektinda, kiel, ekzemple, kiam oni vidas akrobaton laboranta. Tiam ankaŭ mi diras: „Tio estas respektinda“ kaj mi ne kapablas imiti lin. Sed por aŭtoro tio ne estas normala, regata stilo. Kondiĉo por bona stilo estas, ke en unu frazo estu dirata nur unu afero, kaj en ĝi ne aperu pensoj dume alvenintaj.

Estas pli bone, diri ion rekte, ol poste korekti per interfrazoj, ĉar tio malfaciligas la komprenadon. Unua postulo estas, ke la aŭtoro estu klara. Kiu pensigas siajn legantojn, agas bone, sed kiu laciĝas ilin per akrobata stilo, faras gravan eraron.“

Tiaj frazoj aspektas kiel implikiĝintaj faden-volvaĵoj. Por povi kompreni ni devas malimpliki ilin. Tio ne ĉiam estas facila, kiel montriĝas el jenaj citaĵoj, en kiuj la tradukintoj sklave sekvis la originacion anstataŭ redoni ĝin en lingvo glate legebla:

A

Ne tiel

1. Ĉu vi volas permesi al mi porti la leporon, Anĉjo? malgranda knabo kun pajleflavaj haroj kaj kafebrunaj vangoj kiu sur la lasta duno de Schoorl aperis el la arbeto, en kiu li tranĉis por si bastonon, demandis, vidante la harajn kruojn el la reto de la ĉasajuko.

B

. . . sed tiel ĉi.

Sur la lasta duno de Schoorl aperis el la arbeto — en kiu li tranĉis por si bastonon — malgranda knabo kun pajleflavaj haroj kaj kafebrunaj vangoj. „Ĉu mi povas porti la leporon, Anĉjo?“ li demandis, vidante la harajn kruojn elstarantajn el la ĉasosako.

La tradukado de tiaj frazoj ofte postulas multan pripensadon. Oni do erarus, opiniante, ke tradukisto, sidante antaŭ sia skribmaŝino, povas labori seninterrompe. Eĉ la plej spertaj el ili serĉas dum multaj tagoj solvon por iu esprimo aŭ stila malfacilaĵo, kiun ili ne volas redoni malklare, rigide aŭ priskribe.

Pri la hundo de ĉi tiu ĉasisto ni legas, kun kiom da signoj de ĝojo ĝi forlasas la hejmon por iri ĉasi kun sia mastro. Jen la daŭrigo de la rakonto:

2. Lia mastro nur bezonas kapti la pafilon kaj tiu ĉi movo tuj aperigas antaŭ la ekflamigita imago de la hundo la plej belegajn perspektivojn de ĝuo kaj feliĉegeco, pri kiuj mi estas konvinkita, ke la nomitaj ĝojsignoj estas nur malfortaj pruvoj kompare kun la sento, kiu tratiklas ĝian vilan bruston kaj tiel estas, malgraŭ ke ĝi tre bone scias, ke por ĝi ĉiuj plezuroj de la tago konsistos en kurado, starado, pelado kaj alportado, ne povante iam aŭ intertempe havi kelkan esperon al la plej malgranda parto de la akiraĵo.

Sufiĉas nur, ke ĝia mastro ekprenu la pafilon, por ke tuj aperu antaŭ la ekflamiginta imago de la hundo la plej brilaj perspektivoj pri ĝuo kaj feliĉo. Mi estas konvinkita, ke kompare kun la sento, kiu travibras ĝian vilan bruston, la nomitaj ĝojsignoj estas nur malfortaj pruvoj pri tiuj perspektivoj. Ĝi tamen tre bone scias, ke por ĝi ĉiuj plezuroj de la tago konsistos nur el kurado, starado, pelado kaj alportado, sen kelka espero ricevi eĉ plej malgrandan parton de la akiraĵo.

La maldekstra frazo estas tro longa kaj tro komplika.

3. La perdrikoj ĉiufoje pluestis al li antaŭeniraj.

La perdrikoj, ĉiufoje forflugante, restis antaŭ li.

4. Sed tiel lia animo estis priokupita de perdrikoj, ke mi preskaŭ kredas, ke leporo povus laŭlarĝe transiri lian vojon, sen ke li, kiel ajn bona ĉasisto li estis, tion rimarkus, krom tro malfrue.

Sed lia animo estis tiel okupita de perdrikoj, ke mi inklinas kredi, ke — kiel ajn bona ĉasisto li estis — nur tro malfrue rimarkus leporon transiranten lian vojon.

5. Trafite Trees alrigardis ŝin. En tiuj vortoj, en la tono de la voĉo de Net ŝi perceptis esprimon de malhavo. Subite ŝi vidis, kiel teda kaj sencela estas la vivo de Net kompare al ŝia, senzorga, sed al Net mankis iu vivcelo. Ŝi havis sian infanon.

Trafite Trees rigardis ŝin. En tiuj vortoj kaj en la voĉo de Net ŝi perceptis esprimon de malhavo. Subite ŝi vidis, kiel teda kaj sencela estas la vivo de Net, senzorga kompare al la ŝia. Ŝi havis sian infanon, sed al Net mankis vivocelo.

La vortoj „kompare al ŝia senzorga“ estas malklaraj: kies vivo estas senzorga: ĉu la vivo de Trees aŭ la vivo de Net? Laŭ la originalo la vivo de Net kompare al tiu de Trees. Ankaŭ la modifo de la lasta parto faras la frazon pli klara.

La penso iru, kiom eble, rekte antaŭen kaj dume ne iru returne al iu nekonvena loko en la frazo por sekvi de tie alian direkton, ĉar tio ĝenas la komprenadon, ekz.:

6. En la unua tempo de sia kunvivado ŝi estis plene feliĉa. En ĝi estis tiom da amindeco, tiom da tuta nova ĉarmo, la vivado kune kun li en propra hejmo.

Komence de ilia kunvivado ŝi estis plene feliĉa. Estis tiom multe da amindeco, tiom multe da tute nova ĉarmo en la vivado kun li en propra hejmo.

7. Ŝi nun timis tion pro sia infano kiam ŝi pripensis, ke ĝi estas grandigonta sen patro, eksteredzeca infano, ŝi povus kriegi pro mizero.

Ŝi nun timis tion pro sia infano; pripensante, ke ĝi — eksteredzeca infano — estas kreskonta sen patro, ŝi povus kriegi pro mizero.

La vortoj „eksteredzeca infano“ kondukas nin returne al „ĝi“. Tio ne favoras glatan komprenon. Pli bone estas, doni al tiuj vortoj la ĝustan lokon, nome kiel apozicion de „ĝi“ (vidu B).

8. La eskimohundoj, ĉiam havas ĉefon, kiu iras antaŭe, kiam ili estas jungitaj al sledo. Estas kelkfoje tre saĝaj hundoj, tiuj ĉefoj, kaj la aliaj hundoj ĉiam obeas ilin.

La eskimohundoj ĉiam havas ĉefon, kiu iras fronte, kiam ili estas jungitaj al sledo. Kelkaj el tiuj ĉefoj estas tre saĝaj, kaj la aliaj hundoj ĉiam obeas ilin; aŭ: . . . Inter tiuj ĉefoj estas kelkaj tre saĝaj ktp.

„Kelkfoje“ estas tie ĉi ne ĝuste uzita. Temas ne pri la nombro de fojoj, sed de ĉefoj.

9. Inter la dikaj sinjoroj de la lasta tempo jura doktoro Henriko Johan Bruis meritis, kvankam ne la unuan, tamen ankaŭ lokon.

Inter la dikaj sinjoroj de la lasta tempo ankaŭ sinjoro jura doktoro Henriko Johano Bruis meritas lokon, kvankam ne la unuan.

10. Mi ne povas silenti, ĉar ĝi tre konsternis nin, same kiel vian fratinton. Unue nia Bertus, kiun ni perdis per la morto kaj nun vi kaŭzis tion al ni.

Mi ne povas silenti, ĉar ĝi tre konsternis nin, same kiel vian fratinton. Unue trafis nin la morto de Bertus, kaj nun tio, kion vi kaŭzis al ni.

Ĉi tiu citaĵo estas prenita el traduko de riproĉa letero de patrino — kies filo antaŭ ne lange mortis — al sia filino, kiu kondutis malbone.

La rilato inter la du partoj de la citaĵo ne estas klare esprimita kaj tial alilandanoj ne tuj komprenas tiun ĉi parolmanieron. La teksto en B estas tuj komprenebla.

11. Kun tima sento ŝi sidis en la vagonaro. Ankoraŭ neniam ŝi estis tiel longe for de sia infano — kaj plie tiu butikio, al kiu ŝi estis iranta!

Ŝi sidis en la vagonaro kun tima sento pri sia infano: ankoraŭ neniam ŝi forlasis ĝin por tiel longa tempo — kaj krome pri la butikio, al kiu ŝi nun iris!

aŭ:

Ŝi sidis en la vagonaro kun tima sento pri sia infano — kiun ŝi ankoraŭ neniam por tiel longa tempo forlasis — kaj krome pri la butikio, al kiu ŝi estis iranta!

Ĉi tiu citaĵo temas pri virino, kiu akceptis oficon de vendistino en butikio en alia urbo. Tie ŝi loĝos pensione kaj tial ŝi povos nur unufoje semajne reiri hejmen por unu tago. Dum tuta semajno ŝi do ne revidos sian infanon, kiun ŝi konfidis al sia patrino. En la vagonaro survoje al sia nova okupo, la pensoj pri sia infano kaj la butikio premas ŝin. La frazparto „kaj plie tiu butikio, al kiu ŝi estis iranta!“ ne montras klare rilaton kun la antaŭaj vortoj. En B la rilato estas pli klara.

12. Ŝi tralegis la gazetojn por konvena okupo, sed ĉiam estis eksterdoma laboro — kaj kion en tiu okazo pri la infano?

Ŝi tralegis la gazetanoncojn serĉante konvenan okupon, sed ili proponis nur laboron eksterdoman; kion ŝi do faru pri la infano, se ŝi akceptus tian laboron? (aŭ: kie ŝi do lasu la infanon, se ŝi akceptus tian laboron?)

Ankaŭ en ĉi tiu frazo la rilato inter la du partoj ne estas klare esprimita. La originala frazo signifas, ke ŝi tralegis la gazetanoncojn serĉante konvenan okupon, sed ili proponis nur eksterdoman laboron. Tian laboron ŝi ne povis akcepti, ĉar ŝi ne sciis, kie ŝi devus lasi la infanon. — La kunteksto eble helpas nin kompreni tiajn frazojn, sed prefere oni esprimu sin rekte. Redaktita kiel en B la frazo estas simpla kaj klara.

La jena citaĵo estas pli malsimpla ol la antaŭaj. Por ke vi povu iom orienti vin ni citas unue la frazon, kiu ĝin antaŭiras. La okazaĵo havas lokon en malgranda boato:

„Harris, vagante ĉirkaŭe, tretis sur la piedkalon de Georgo. Se ĉi tio estus okazinta antaŭ la manĝo, Georgo esprimus esperojn kaj dezirojn rilate al la sorto de Harris en ĉi tiu mondo kaj la transa, kiuj frostotremigus penseman homon. Anstataŭe li diris: „Atentu, mia knabo, estu singarda.“

Klopodu nun glatigi ĝian daŭrigon:

13. Kaj Harris, anstataŭ respondi per siaj plej malagrablaj tonoj, ke oni apenaŭ ne povas treti sur iun parton de la piedo de Georgo, se oni ja devas sin okupi en distanco de dek metroj de tie, kie sidas Georgo, sugestante, ke mezgrandan boaton Georgo kun piedoj tiom longaj, neniam rajtas eniri, kaj konsilinte, ke li pendigu ilin trans la boatrando, kiel li certe estus farinta antaŭ la manĝo, nun diris: „Ho, mi tre bedaŭras, maljuna knabo, mi esperas, ke mi ne dolorigis vin.“

Kaj Harris ne respondis kun sia kutime plej malagrabla tono, ke oni, devante sin okupi en distanco de dek metroj de tie, kie sidas Georgo, apenaŭ ne povas treti sur iun parton de ties piedo. Li nek aludis, ke al Georgo, kun kruroj tiom longaj, oni ĉiam devus rifuzi eniron en mezgrandan boaton, nek konsilis, ke li pendigu siajn krurojn trans la boatrandon, kiel li antaŭ la manĝo certe estus farinta. Sed anstataŭe li diris nur: „Ho, mi tre bedaŭras maljuna knabo; mi esperas, ke mi ne dolorigis vin.“

5. Forĵetu balaston!

En 1913 la Lingva Komitato akceptis la jenajn principojn pri la vortfarado:

a. Principo de neceso:

En konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, sufiksojn, prefiksojn kaj finiĝojn necesajn por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan de tiu vorto.

b. Principo de sufiĉo:

Se la ideo tiamaniere esprimita estas jam bone kaj nekonfuzeble komprenata el la kunteksto sen iu el la sufiksoj uzitaj, tiu ĉi sufikso povas esti elĵetata kiel neutila kaj nenecesa.

Laŭ la dua principo oni povas forlasi el la vortoj pardonemeco, forgesemeco, kantaĵo, klarigaĵo, manĝaĵo, skribitaĵo, skribaĵo la kur-sive presitajn sufiksojn.

Studinte la Biblio-tradukon de Zamenhof, Lanti diris pri tiu principo:

„Estas klare, ke la Majstro emis pli kaj pli senbalastigi sian stilon forlasante neutilajn sufiksojn. Jen ekzemplo: „Kaj faru la altaron el akacia ligno, havanta la *longon* de kvin ulnoj; kvarangulo estu la altaro kaj ĝia *alto* estu tri ulnoj.“

Kiel oni vidas, la sufikso estas forlasita sen ia domaĝo por la klaro. Same Zamenhof tre ofte forlasis la sufikson aĵ kaj diris: *riĉo, havo, kovro, dono, plano, akiro*, k. s. en kazoj kiam oni kutimas diri balaste: *riĉ-aĵ-o, hav-aĵ-o*, k. t. p.

Kompreneble, la aŭtoro uzas tiujn sufiksojn, kiam li opinias, ke ili estas necesaj por eviti erarkomprenon, sed estas rimarkeble, ke lia sola regulo estas atingi per kiel eble malplej da vortelementoj perfektan kompreneblon.“

Lanti kritikis ankaŭ la preferon por longaj pezaj formoj kiaj *ĉiamaniere, kiamaniere, neniamaniere, tiamaniere* anstataŭ la simplaj *ĉiel, tiel* k. t. p., kaj nomas la unuajn internaciecaj, la duajn — senaciaj. Pri tiu prefero li kulpigas la nekonscian ligitecon al la gepatra lingvo kaj opinias la uzantojn nekonsciaj naciemuloj, ĉar ili aplikas tute senbezone sufiksojn kaj longajn pezajn formojn, pro kio Esperanto pliproksimiĝas al ilia nacia lingvo. Tial oni ofte uzas adverbajn participajn anstataŭ simplajn, ekz.:

A

Ne tiel

1. La mastro minacante rigardis lin.
2. „La instruisto!“ subite sonis kelkaj avertantaj voĉoj.
3. „Atentu, knabo“, li siblante diris.
4. La fratineteto estis tiel ĝenanta.
5. „Ĉu vi?“ li rikanante diris.
6. „Silentu!“ admonante diris Tos, „Paĉjo dormas!“
7. Jen staris la mastro, ĉiam esplorante rigardante.
8. Kes admirante observadis.
9. Tio korŝirante penetris en la orelojn de Jaĉjo.

B

. . . sed tiel ĉi.

- La mastro minace rigardis lin.
- „La instruisto!“ subite sonis kelkaj avertaj voĉoj.
- „Atentu, knabo“, li sible diris (aŭ: siblis).
- La fratineteto estis tiel ĝena.
- „Ĉu vi?“ li diris rikane.
- „Silentu!“ diris Tos admone. „Paĉjo dormas.“
- Jen staris la mastro, ĉiam explore rigardante.
- Kes admire observadis.
- Tio korŝire penetris en la orelojn de Jaĉjo.

Sub influo de la gepatra lingvo oni uzas vortojn kaj formojn superfluaĵn, kio nenecese malsimpligas la stilon. Pro tio estas konsilinde, apliki la menciitan principon pri sufiĉo pli vaste.

Se en la jenaj ekzemploj oni forigos la superfluaĵn vortojn, la signifo de la frazoj ne ŝanĝiĝos kaj la stilo iĝos pli simpla.

A	B
Ne tiel sed tiel ĉi.
1. Tiu bubo ŝiris sian pantalonon difekta.	Tiu bubo ŝiris sian pantalonon.
2. Per sia daŭra observado la mastro antaŭenpelis la laboristojn.	Per sia daŭra observado la mastro pelis la laboristojn.
3. Per tiu penso li provis trankviligi sin mem.	Per tiu penso li provis trankviligi sin.
4. Ŝi demandis, ĉu eble iu el ŝiaj konatoj bezonas kudristinon.	Ŝi demandis, ĉu iu el ŝiaj konatoj bezonas kudristinon.
5. Ankoraŭ ĉiam la anonco troviĝas en la gazeto.	La anonco ankoraŭ troviĝas en la gazeto.
6. Trees, ni foje interparolu! — Venu foje tie ĉi!	Trees, ni interparolu! Venu tien ĉi, mi petas.
7. Ili marŝis antaŭen rekte al la budo.	Ili marŝis rekte al la budo.
8. Postmorgaŭ li estos jam dek-unujara kaj ĉiam li ankoraŭ ne kaptis sian unuan fokon.	Postmorgaŭ li estos jam dek-unujara, sed li ankoraŭ ne kaptis sian unuan fokon.
9. Ili ne tiel ĝenu min!	Ili ne ĝenu min!
10. Li tirmalfermis la tirkeston.	Li malfermis la tirkeston.
11. La ĉevalo ĉevalblekas.	La ĉevalo blekas.
12. Li ĉiufoje tra ĉiuj konfuzaj pensoj refoje sentas la dankemon	Ĉiufoje li sentis tra ĉiuj konfuzaj pensoj la dankemon.
13. Tio gustas bonguste.	Tio gustas bone.
14. Ŝi firmtenis la ŝnuron.	Ŝi tenis la ŝnuron.
15. La barko ŝipveturis sub la ponto.	La barko veturis sub la ponto.

Rimarko ĉe:

6. Se foje signifus iam la frazoj ne estus korektendaj.

Evitu ripetojn ne nepre necesajn, ekz.:

A

Ne tiel

1. Tiu granda amo, pri kiu li parolis, ĝi neniam ekzistas.

2. Li scias, ke mi trovas tion malagrabla, iri sola en la mallumo.

3. Tiam, tiun vesperon, li iros.

4. Ili estis preĝintaj, la gepatroj, surgenuintaj apud la malgranda lulilo.

5. Nun ili perlaboras monon, lia patro kaj li.

6. Sed sian pilkon, tiun li volis havi.

7. Ŝi estas tiel malriĉa, lia patrino!

Evitu multvortecon, se la ideo povas esti esprimata pli simple, ekz.:

A

Ne tiel

1. Dum ŝi ankoraŭ parolis, ŝi jam pentis tion.

2. Estu silenta!

3. Tiel longe kiel daŭris la somero, la ŝipestro restis ĉe la eskimoj.

4. Li ĝuste intencis eniri sian aŭtomobilon, kiam

5. Post kiam ili manĝis kelkan tempon, ĉiuj iris eksteren.

B

. . . sed tiel ĉi.

Tiu granda amo, pri kiu li parolis, tute ne ekzistas.

Li scias, ke mi trovas malagrabla, iri sola en mallumo.

Tiam li iros, aŭ: Tiun vesperon li iros.

La gepatroj estis surgenuie preĝintaj apud la malgranda lulilo.

Nun lia patro kaj li perlaboras monon.

Sed sian pilkon li volis havi.

Sed lia patrino estas tiel malriĉa!

B

. . . sed tiel ĉi.

Ankoraŭ parolante, ŝi jam pentis tion.

Silentu! (mi petas).

Dum la tuta somero la ŝipestro restis ĉe la eskimoj.

Li estis enironta sian aŭton, kiam

Manĝinte kelkan tempon, ĉiuj iris eksteren.

- | | |
|---|--|
| 6. La nordaj cervoj ĉiam estas scivolemaj. | La nordaj cervoj estas scivolemaj. |
| 7. Ne dirante vorton, la virinoj alportis al ili la plej varmajn vestojn. | Silente (aŭ: Ne parolante, aŭ: Senvorte) la virinoj alportis al ili la plej varmajn vestojn. |
| 8. Mi ne pli longe kaŝos al vi la veron. | Mi ne plu kaŝos al vi la veron. |
| 9. Dum la daŭro de la vintro. | Dum la tuta vintro. |
| 10. En aliaj vesperoj ŝi vidis ĉion ĉi, sen ke tio ĝenis ŝin. | En aliaj vesperoj ŝi vidis ĉion ĉi, ne ĝenate de tio. |

Tamen ne en ĉiuj kazoj oni povas agi tiel. Multo dependas de la ĉirkaŭa teksto, ne nur en la signifo, sed ankaŭ en la vortuzo. Tial ni finas ĉi tiun ĉapitron per jenaj vortoj de Lanti, kiu en sia traduko „Kandid“ serioze klopodis malpezigi sian stilon:

„Sed vi devas tamen kompreni, ke en la vivo de lingvo interpuŝiĝas diversaj principoj: analogio, eŭfonio, logiko, reguleco k. t. p. Estas neeble difini tute precizajn kaj absolutajn regulojn. Cetere, ne ĉiam pleonasmo estas foriginda: necesas foje insisti, por doni pli da esprimforto al iu vorto; okazas, ke ia logika mallonga formo estas malbonsona

Ni memoru la saĝajn konsilojn de la aŭtoro de nia lingvo; li ja ĉiam rekomendis, ke oni ne devas ĝin kateni per tre severaj reguloj. Sed estas por mi klare, ke la plej simplaj formoj venkos, ke la plej klara stilo sin trudos kaj fariĝos klasika. Kiu penas atenti tiujn postulojn de la vivo, kiu penas kiel eble plej senbalastigi sian stilon, tiu iras en la ĝusta direkto.“

6. Bona stilo estas logika.

Kvankam en Esperanto la logiko ne regas absolute, ĝi tamen ludas pli gravan rolon ol en lingvoj naciaj. La logiko ja devas ŝirmi ĝin kontraŭ tiaj nacilingvaj influoj, kiaj farus ĝin internacie nekomprenebla aŭ igus nin diri ion alian ol kion diri ni intencis, alivorte: per logika pensado ni evitos ne- kaj miskomprenon. Konata ekzemplo de nekomprenebla teksto — laŭvorte tradukita el la rusa lingvo — estas tiu, kiun kiel ekzemplon donis D-ro Zamenhof en unu el siaj Lingvaj Respondoj:

„Favora Regnestro! Honoro havas alkuŝigi, kio laŭ kaŭzo de antaŭskribita al mi kun kuracisto kuraco mi en efektiva tempo ne en stato elpleni de donita kun mi al vi promeso; apud kio postaperigas, ke mi turnos sin al domo tra du monatoj, ne pli frue de fine Aŭgusto.“

„Tiu ĉi sama peco“, diris D-ro Zamenhof, „en stilo Esperanta sonus tiamaniere:

„Estimata sinjoro! Mi havas la honoron raporti al vi, ke kaŭze de kuracado, rekomendita al mi de la kuracisto, mi en la nuna tempo ne povas plenumi la promeson, kiun mi donis al vi; mi ankaŭ sciigas al vi, ke mi revenos hejmen post du monatoj, ne pli frue ol en la fino de Aŭgusto.“

En ĉapitro — mi donis diversajn ekzemplojn de frazoj kaŭzantaj miskomprenon pro neĝusta loko de iuj vortoj, ekz.: „Ĉi tie oni nur parolu Esperanton“, per kiu frazo oni volis diri: „Ĉi tie oni parolu nur Esperanton“.

Jen kelkaj ekzemploj de alispeca mallogika esprimmaniero:

A

Ne tiel

1. Li kuris al sia domo, sed preskaŭ atinginte ĝin, li subite restis staranta: li rimarkis, ke li forgesis sian ŝlosilon.

2. La kongreso okazos dum aŭgusto.

3. Ĉi tie mi dormis dum la kongreso.

4. Estis agrabla vespero. La prezidanto faris festparoladon, dum fraŭlino Jansen kantis arion de Mozart.

5. Tie regis virinoj, kiuj batalis kun siaj malamikoj.

6. „Ĉu ni restos aŭ ĉu ni foriros?“ demandis sinjoro al sia edzino en kinejo, ĉar la filmo ne interesis ilin.

B

. . . sed tiel ĉi.

Li kuris al sia domo, sed preskaŭ atinginte ĝin, li subite haltis: li rimarkis, ke li forgesis sian ŝlosilon.

La kongreso okazos en aŭgusto.

Ĉi tie mi dormis okaze de la kongreso.

Estis agrabla vespero. La prezidanto faris festparoladon; kaj poste fraŭlino Jansen kantis arion de Mozart.

Tie regis virinoj, kiuj batalis kontraŭ siaj malamikoj.

„Ĉu ni restu aŭ ĉu ni foriru?“ demandis sinjoro al sia edzino en kinejo, ĉar la filmo ne interesis ilin.

Rimarkoj ĉe:

1. Oni ne povas *resti* staranta, se oni ne *estas* staranta! Li ja estis kuranta! Krome, ne estas eble *subite resti staranta!* Kio do okazis? Nu, li subite haltis!
2. La frazo „La kongreso okazos dum aŭgusto“ estus korekta, se la kongreso okazus 1-a a ĝis la 31-a de aŭgusto. Sed per *dum aŭgusto* oni ordinare volas diri: *en aŭgusto*.
3. La frazon: „Ĉi tie ni dormis dum la kongreso“, ni legis sub foto, sur kiu kelkaj esperantistoj staras antaŭ lernejo, kiun oni destinis kiel dormejon por kongresanoj. La subskribo fakte diris, ke ili dormis tie kiam aliloke oni kongresis!
4. Ni ne kredas, ke la fraŭlino kantis samtempe kiam la prezidanto parolis!
5. En pluraj lingvoj oni uzas post batali *kun* kaj *kontraŭ* en la sama signifo. Sed Anglujo batalis kun Francujo kontraŭ Germanujo. Ili batalis ne *kun*, sed *kontraŭ* la faŝismo.
6. „Ĉu mi ricevos monon?“ Jen demando al antaŭdiristino. Ŝi ja scias, kion la estonteco kaŝas al ni (se oni volas kredi tion). „Ĉu ni restos aŭ ĉu ni foriros?“ estas frazo samspeca. En tiu ĉi okazo oni devas esprimi sin per la subjunktivo: „Ĉu ni restu, aŭ ĉu ni foriru?“

Ne estas eble menciĝi ĉiujn erarojn koncerne logikon, kiun ni trovis en la literaturo, sed pri unu speciala eraro ni volas akcente atentigi la legantojn, ĉar ĝi estas tre populara. Ni aludas la partícipon absolutan: En adverba partícipo ni povas esprimi plenan subpropozicion, ekz.:

Aŭdante tion, ŝi ekploris.

La uzado de adverba partícipo en tiaj frazoj estas ĝusta nur, se la subjekto de la subpropozicio estas la sama, kiel tiu en la ĉefpropozicio. Ĉi supra frazo do estas korekta: la neesprimita subjekto de *aŭdante tion*, estas la sama kiel en *ŝi ekploris*. Ŝi aŭdis kaj ŝi ekploris, do same kiel en la plena subpropozicio: Kiam *ŝi* aŭdis tion, *ŝi* ekploris. Konsideru nun jenajn frazojn:

1. *Aŭdante tion, larmoj fluís el ŝiaj okuloj.*

Tiu frazo ne estas korekta, ĉar la — *neesprimita* — subjekto de *aŭdante* estas *ŝi*, sed la subjekto de *fluís* estas *larmoj*. La frazo do signifas, ke la larmoj aŭdis tion! Sed la aŭtoro volis diri: *Kiam ŝi aŭdis tion, larmoj fluís el ŝiaj okuloj.*

2. *Demandante al si mem, ĉu tiu homa ombro estas Machteld aŭ iu alia, trakuris glacie malvarma tremado tra lia korpo.*

Laŭvorte tio signifas, ke glacie malvarma tremado demandis al si, k. t. p. Sed la aŭtoro intencis diri: *Kiam li demandis sin, ĉu tiu homa ombro estas Machteld aŭ iu alia, glacie malvarma tremado trakuris lian korpon.*

3. *Kantante „La Espero“, la vagonaro forveluris, signifas laŭvorte, ke la vagonaro kantis nian himnon dum sia forveturo. Sed oni volis diri: Dum ni kantis „La Espero“, la vagonaro forveluris.*

Korektu jenajn frazojn en kolono A kaj komparu vian solvon en kolono B:

A

Ne tiel

1. Trinkinte tason da kafo, la vojaĝo estis daŭrigata.

2. Juĝante laŭ liaj vestoj, li estas pastro.

3. Estante homevitema, la altira forto, kiun la malsanulejo havis por ŝi antaŭ unu horo, nun estis for.

4. Enfermite mi sendas al vi nian plej novan prospekton.

5. Konante tiujn du faktojn, ŝajnas al mi facile por ĉiu pripensema homo prezenti al si jenan eblon.

6. Promenante, lin kaptis la deziro bani sin.

7. Aŭdante pri la mirindaĵoj, kiujn la soldato rakontis, suno ekbrilis en nia animo.

B

. . . sed tiel ĉi.

Trinkinte tason da kafo, ni daŭrigis la vojaĝon.

Se mi juĝas laŭ liaj vestoj, li estas pastro; aŭ: Juĝate laŭ siaj vestoj, li estas pastro.

Ĉar ŝi estis homevitema, la altira forto, kiun la malsanulejo havis por ŝi antaŭ horo, nun estis for.

Ĉi kune mi sendas al vi nian plej novan prospekton; aŭ: Mi enfermis nian plej novan prospekton.

Ĉar mi konaŝ tiujn du faktojn, ŝajnas al mi facile por ĉiu pensema homo prezenti al si jenan eblon.

Kiam li promenis, kaptis lin la deziro bani sin; aŭ: Promenante, li ekdeziris bani sin.

Kiam ni aŭdis pri la mirindaĵoj, kiujn la soldato rakontis al ni, ekbrilis suno en nia animo.

8. Ĉion konsiderinte, la vegetara nutraĵo estas pli bona.

Se ni ĉion konsideras, la vegetara nutraĵo estas pli bona; aŭ: Ĉion konsiderinte, ni opinias, ke la vegetara nutraĵo estas pli bona.

9. Esplorante iun lingvan fenomenon en Esperanto, la bazo de la esploro devas esti Esperanto mem.

Se ni esploras iun lingvan fenomenon en Esperanto, la bazo de la esploro devas esti Esperanto mem; aŭ: Esplorante iun lingvan fenomenon en Esperanto, oni devas bazi sian esploron sur Esperanto mem.

10. Tremegante kvazaŭ de frosto, el li eksplodis senhelpa ploro.

Dum li tremegis kvazaŭ de frosto, el li eksplodis senhelpa ploro.

11. Klininte sin super la kolo de sia ĉevalo, ĉi tiu rapidegis ĝis la rando de la erikejo.

Post kiam li klinis sin super la kolo de sia ĉevalo, ĉi tiu rapidegis ĝis la rando de la erikejo.

12. Lin kaptis furiozo, legante pri ĉi tiu skandalo.

Kaptis lin furiozo, kiam li legis pri tiu skandalo.

13. Pensante pri tio, ŝia koro pleniĝis per malĝojo.

Kiam ŝi pensis pri tio, ŝia koro pleniĝis per malĝojo.

14. Bruna (= estante bruna) kiel arabino, ŝiaj okuloj estis profundaj kaj nigraj kiel la nokto.

Bruna kiel arabino, ŝi havis okulojn profundajn kaj nigrajn kiel la nokto.

15. Aŭskultante vian radio-paroladon, frapis min, ke vi malĝuste elparolis la nomon de la komponisto.

Kiam mi aŭdis vian radio-paroladon, frapis min, ke vi malĝuste elparolis la nomon de la komponisto.

16. Kiel nederlandano (= estante nederlandano) miaj oreloj devis kutimiĝi al tiu esprimo.

Ĉar mi estas nederlandano, miaj oreloj devis kutimiĝi al tiu esprimo.

17. Je la oka, la reĝino enirante, estis kantata la nacia himno.

Je la oka, dum la eniro de la reĝino, estis kantata la nacia himno.

18. Trinkante je la sano de niaj amikoj, preterpasis nin kelkaj amsterdamaj stratmuzikistoj.

19. Reveninte en la urbon, bultenoj pri la mobilizado altiris nian atenton.

20. Kiam la vagonaro eniris la stacidomon, la aerpremo kaptis la hundon kaj ĵetis ĝin sur la dorson. Baraktante kelkajn momentojn per la piedoj, la vagonoj ruliĝis trans la beston, ne vundante ĝin.

21. Pentoplene konfesante sian kulpon, la prokuroro postulis tri semajnojn da mallibero.

Kiam ni trinkis je la sano de niaj amikoj, preterpasis nin kelkaj amsterdamaj stratmuzikistoj; aŭ: Trinkante je la sano de niaj amikoj, ni ekvidis kelkajn amsterdamajn stratmuzikistojn preterpasi.

Kiam ni estis revenintaj en la urbon, bultenoj pri la mobilizado altiris nian atenton.

Kiam la vagonaro eniris la stacidomon, la aerpremo kaptis la hundon kaj ĵetis ĝin sur la dorson. Dum ĝi baraktis kelkajn momentojn per la piedoj, la vagonoj ruliĝis trans la beston, ne vundante ĝin.

Post kiam la juĝoto pentoplene konfesis sian kulpon, la prokuroro postulis tri semajnojn da mallibero.

7. Nesufiĉa akcento.

La akcento, kiun iu vorto bezonas, estu klara. Sub nekonsciata influo de la gepatra lingvo oni ne ĉiam atentis tion, pro kio la bildo, kiun oni volas krei en la imago de la leganto, ne estas same klara en Esperanto kiel ĝi estas en la originalo, eĉ povas kaŭzi dubon kaj miskomprenon, ekz.:

A

Ne tiel

1. Ne unu momenton mi bezonis atendi.

2. Ne unu fojon mi havos motivojn plendi pri la konduto de la knabo.

B

. . . sed tiel ĉi.

Eĉ ne unu momenton mi bezonis atendi.

Eĉ ne unu fojon mi havis motivojn plendi pri la konduto de la knabo.

3. Li estis tiom surda, ke li ne povis aŭdi unu vorton de la parolado.
4. Jaĉjo ne diris vorton.
5. Ne unu fojon dum tiu tempo mi renkontis lin.
6. Miaj instruistoj vane instruis al mi skribi legeble. Skribi legeble mi ankoraŭ ne povas.
7. Jam en mia dudekjara aĝo mi estis konvinkita — kaj tia mi estas ankoraŭ — ke Esperanto venkos.
8. Al li ŝi korigiĝis kiel neniam antaŭe al iu.
9. Forgesante mian laboron kaj ĉion, mi kuris al la brulo.
10. Kiel mi ŝi forlasis sian hejmon por migri al Nov-Zelando.
11. Ĉiuj hundoj danke svingis la voston, kiam ili ricevis sian duan fiŝeton, sed ne unu faris tion tiel fervore kiel Barbe.
12. Kvankam vi ne vidis lin, mi tamen havas filon kaj tre bravan!
13. Regajigis ŝin, ke iu atentis ŝin, se estas nur fraŭlino B.
14. La samtempa morto de miaj patrino kaj patro estis la granda travivaĵo de mia infanaĝo.
- Li estis tiom surda, ke li eĉ ne unu vorton de la parolado povis aŭdi.
- Jaĉjo ne diris eĉ unu vorton, aŭ: Jaĉjo tute silentis.
- Eĉ ne unu fojon dum tiu tempo mi renkontis lin.
- Miaj instruistoj vane instruis al mi skribi legeble. Skribi legeble mi ankoraŭ nun ne povas.
- Jam en mia dudekjara aĝo mi estis konvinkita — kaj tia mi estas ankoraŭ nun — ke Esperanto venkos.
- Al li ŝi korigiĝis kiel neniam antaŭe al iu alia; aŭ: . . . kiel al neniu antaŭe.
- Forgesante mian laboron kaj ĉion ceteran, mi kuris al la brulo.
- Same kiel mi ŝi forlasis sian hejmon por migri al Nov-Zelando.
- Ĉiuj hundoj danke svingis la voston, kiam ili ricevis sian duan fiŝeton, sed neniu faris tion tiel fervore kiel Barbe.
- Kvankam vi ne vidis lin, mi tamen havas filon kaj eĉ tre bravan!
- Regajigis ŝin, ke iu ŝin atentis, eĉ se estas nur fraŭlino B.
- La samtempa morto de miaj patro kaj patrino estis la plej granda travivaĵo de mia infana tempo.

- | | |
|--|--|
| 15. Mi estas konvinkita, ke amo kaj vero formas potencon, kiu superas ĉiun potencon. | Mi estas konvinkita, ke amo kaj vero formas potencon, kiu superas ĉiun alian potencon. |
| 16. Li ne havis glitŝuojn. Li eĉ ne havis ŝuojn. | Li ne havis glitilojn; eĉ ŝuojn li ne havis; aŭ: Li ne havis glitŝuojn; eĉ ordinarajn ŝuojn li ne havis. |

Rimarkoj ĉe:

1. „Ne unu momenton“ povas signifi „neniun momenton“ kaj „pli ol unu momenton“. La celo de la originalo estas: „neniun momenton“ — „eĉ ne unu momenton“. Same ĉe 2.
3. Tio signifas, ke la tutan paroladon li povis aŭdi, escepte de unu vorto!
6. Voĉe oni povas akcenti „ankoraŭ“, sed legate tiu akcento ne reliefiĝas. Tial estas necese aldoni la vorton „nun“.
7. „Ŝuojn“ ĉe la fino de du frazoj sonas malbele. Oni povas eviti tion anstataŭigante la vorton „glitŝuoj“ per „glitiloj“, aŭ aldoni „ordinarajn“.

8. Bona stilo estas varia.

Ne nur la vestoj de nia korpo, sed ankaŭ tiuj de niaj pensoj suferas pro uzado. Vortoj kaj esprimoj tre ofte uzataj en iu verko iom post iom perdas sian freŝecon, sian esprimforton kaj faras la tekston monotona kaj teda. Precipe en temoj kiaj historio, vojaĝado, raportoj pri kongresoj k. s. kiuj postulas sinsekvantan notadon de faktoj kaj okazintaĵoj inter si pli-malpli similaj, kaŝiĝas la danĝero fali en tiun pekon kontraŭ bona stilo.

En iu vojaĝraporto ĝia aŭtoro senĉese ripetis la samajn — nur kelkajn — adjektivojn por esprimi siajn miron kaj admiron pri tio, kion li vidis kaj spertis dum sia vojaĝo. Kiel ekzemplon ni donas ĉi sube rikolton el nur 15 sinsekvaj paĝoj:

mirinda vetero — mirinda marbordo — belega vetero — beleco de la insularo — mirinde — grandegaj parkoj — belega sanktejo templo kiu rivalas laŭ beleco — belega libro — mirinde bela — plej mirindaj sanktejoj — mirindaĵoj de tiu urbo — mirinda

sanktejo — belajoj — pagodo unu el la plej belaj — s-ro X. klarigis mirinde — la plej belaj misteraĵoj — ni admiris la belan oktobran pejzaĝon — estas mirige kiom da virinoj laboras — oni admiris la akvofalon kaj aliajn belajojn — estis belega dimanĉo — lertega sekretario — bonega ideo de s-ro X. — ni rigardis la belegan teatron — en la bela centra parko — ĉarmaj knabinoj — belegaj kimonoj — la stacioj estis belege kaj bonege ekipitaj — ĉarmaj samideaninoj — monto, kies pinto estas blankega — s-ro X. estas la plej grava eksportisto — ni vizitis la plej gravajn le-pakejojn — grava urbo — biblioteko — ĉarmaj pejzaĝoj — fama kaj belega monteto — ĉarmaj knabinoj — mirindaj kimonoj — ili dancis belege — donaco de la ĉarmega fraŭlino X — estis tre belega silka pakajo-tuko.

Ne necesas havi tre delikatan guston por rimarki la tro oftan uzadon de *mir'*, *bel'* kaj *ĉarm'*, de la sufiksoj *eg* kaj de la superlativo *la plej . . . a*.

Daŭrigata sur multaj paĝoj, tia stilo baldaŭ ĉesos impresi la leganton kaj fine efikas al li laciĝe kaj tede. Jam longe antaŭ ol la leganto atingis la finon de la libro, tiuj vortoj similas sensukigitajn citronojn ne povantajn plu ellasi eĉ nur unu guton da signifo.

En verko de tia amplekso (pli ol 200 paĝoj) oni devas — precipe komence — uzi tiajn vortojn tre ŝpareme, por ke oni ne simulu la vetkuranton, kiu tuj post la starto uzis ĉiujn siajn fortojn, pro kio ne restis al li sufiĉe da ili por glorie atingi la finon. Tial la aŭtoro de la ĉi supre aludita verko, kiu volis igi nin partopreni liajn admiron kaj entuziasmon, ne plene sukcesis. Lia vortotrezoro estis tro malgranda kaj pro tio li ne kapablis variigi sian stilon.

Por eviti monotonecon en sia verkaĵo, oni zorgu disponi pri sufiĉe da sinonimoj kaj pri iom da lerto por — se necese — esprimi sin alie.

Donante tiun konsilon, ni fakte suriras la kampon de la beletro, de la vort-artisto, kio ne estas la celo de ĉi tiu verkisto. Tamen la atentigo ankaŭ pri ĉi tiu peko kontraŭ bona stilo povas esti utila por akiri bonan esprimmanieron.

9. Evidu nenecesajn neologismojn!

„Sur la terurajn grandegajn vortarojn falis radio de lumo kaj ili komencis rapide malgrandiĝi antaŭ miaj okuloj.“

(D-ro Zamenhof)

a) *La neologismoj anstataŭ la „mal-vortoj“.*

Iam ni ricevis de amiko jenan leteron:

„Ĉi kune mi resendas al vi la libron, kiun mi antaŭ du jaroj pruntis de vi. Pardonu, ke mi tiom longe lasis vin atendi. Verdire, mi ĝin forgesis. Mia memoro iĝas febla, el kio vi povas konkludi, ke mi oldiĝas.“

Nia Esperanto-konscienco protestis kontraŭ tiuj kaj aliaj neologismoj, kiuj celas anstataŭi vortojn kun la prefikso *mal*. Kial iuj inter ni favoras tiujn kaj tiajn neologismojn?

Ni konsideru kelkajn argumentojn kontraŭ la uzado de ĉi tiu prefikso:

En „Parnasa Gvidlibro“ Prof. Waringhien diras, ke

„la ofta uzado de *mal*, *ne* aŭ *sen* por signifi la kontraŭojn . . . malutilas la poezion, ne ĉar ili estas nesufiĉe elvokantaj, sed ĉar ili estas kontraŭsence elvokantaj.“ — „Kiel morfemo la negacio estas tute sena je poezia valoro. Ne rimarkante tion, kelkaj poetoj faris verajn kontraŭencojn; por ke la leganto sentu la malon de koncerna impresio, ne sufiĉas kunmeti negacion kun la vortoj, kiuj ĝin esprimas; ĉar oni ne forigas la tiel evitendan impreson: oni elvokas la imagbildon, dum oni kredas ĝin forpeli. Dezirante priskribi grizan vintran tagon, Grabowski skribis: *La tago malvarma, malgaja, sensuna* . . . , verso taŭga por doni impreson de sunplena somertago: tiun bildon la uzo de *mal* ne forigas de la spirito de la leganto . . . Tiuj mal-vortoj estas vera plago por la poezio . . . “

En „Literatura Mondo“ 1932 Jean Forge traktas kun Stellan Engholm la saman temon:

„Do, laŭ vi Esperanto estas memstara literatura lingvo“, diras Forge, „sed ĉu vi, verkante, ne sentas kelkfoje ĝian artefaritecon, ĝian konstruitecon? Ekzemple la multaj pre- kaj sufiksoj laŭ mia sento malaltigas la literaturan forton de la lingvo. Vortoj, kiel

malami, varmeta, malvarmega, k. t. p., ofte havas specialan esprimon aŭ terminon en la naciaj lingvoj; ili, por tiel diri, estas pli „palaj“ en Esperanto ol en la nacia lingvo. Al mi ofte ŝajnas — mi faris kelkajn tiurilatajn eksperimentojn — ke teksto bone tradukita el Esperanto en nacian lingvon en sia tradukita formo pli impresas ol en sia antaŭa origina formo.“

„Tion mi ne sentas“, kontraŭdiras Engholm, „sed ni konsideru, ke ni staras ankoraŭ en la komenco de la literatura lingvo en Esperanto. Ĝi ankoraŭ estas uzata tro malmulte en la praktiko kaj tial la vortoj ankoraŭ ne penetris tre profunde en la sentojn de la esperantistoj — kiel tio okazis ĉe la ĉiutage uzata nacia lingvo“

„Mi komprenas“, interrompis Forge, „vi estas prava: oni uzas Esperanton tro malmulte en la praktiko! Ni devas lerni rektan pensadon kaj sentadon en la lingvo. Precipe la originala verkisto devas lerni rektan pensadon kaj sentadon en la lingvo. Precipe la originala verkisto devas liberiĝi tute de sia nacia lingvo“.

Ankaŭ Waringhien diras, ke nia lingvo ne estas sufiĉe elvokanta:

„oni nomas elvokiveco de iu vorto ĝian kapablon veki en la spirito de la leganto vidimpreson, imagbildon: la vorto „neĝo“ ekz-e estas elvokanta, ĉar aŭdante ĝin ni mense vidas la blankan kaj malvarman teron glimbrili de pala suno. Nu, tiun kapablon havas tro malmulte da esperantaj vortoj: ĉiuj povas konstati, ke plej ofte nacilingva traduko de poemo estas pli elvokanta ol la, eĉ pli perfekta esperanta“. („Parnasa Gvidlibro“).

Kaj same kiel Engholm, li opinias, ke la kaŭzo de la nesufiĉa elvokiveco (elvokanteco) estas

„la maloftega uzado de Esperanto en la ordinara familia vivo; ĝi estas precipe skribita lingvo, kiun oni parolas nur post longaj intertempoj kaj nedaŭre. Nu, la ĉiutaga uzado havas tiun efikon, ke ĝi nedisigeble ligas la objekton aŭ ĝian imagbildon kun la vorto. Se mi neniam havis okazon indiki markrutojn per ilia nomo, mi ja scias per mia vortaro, ke „klifo“ signifas france „falaises“, sed la franca, ne la esperanta vorto estas elvokanta. Same okazas pri la kunmetitaj vortoj, kiuj respondas al simplaj nacilingvaj vortoj (ekz. patrolando*) se oni ne daŭre kutimiĝas percepti rekte la simplan ideon tra la malsimpla formo, la spirito

* Tio validas por la franca „patrie“, ne por la nederlanda „vaderland“.

ĝin mallerte analizos en ĝiajn elementojn kaj tial ne ricevos la drastan imagbildon, kiu tiel gravas en la poezio.“

Jen, do, la kaŭzo de la nesufiĉa elvokiveco de tiaj vortoj: la malofta uzado.

Observante nian Esperanto-praktikadon, ni povas konstati, ke ne nura parkera lernado, sed praktika uzado ligas la vortojn al la objektoj aŭ iliaj imagbildoj. Komence la vortoj estas al ni fremdaj kaj ni tradukas ilin, sed ju pli ni aplikas la lingvon, des pli firmiĝas tiu interligo kaj des pli frue ni komprenas kaj uzas ilin. Fine ni ne plu tradukas, ĉar ili fariĝis nia posedaĵo.

En la grupo, al kiu ni komence aliĝis, oni parolis preskaŭ ĉiam Esperanton, kaj ni trovis tion memkomprenebla por societo, kiu sin okupas pri fremda lingvo. Verŝajne dank' al tiu kutimo, oni ne sentis la por Waringhien kontraŭsencan elvokon de la mal-vortoj en la poemo „La pluva tago“ tradukita de Grabowski:

La tago malvarma, malgaja, sensuna;
Ne haltas la ventoj kaj pluvo aŭtuna;
Vinujo je l' muro putranta sin tenas,
Sed ĉiu ekblovo foliojn deprenas,
Kaj la tago — malvarma, sensuna.

Mia vivo malvarma, malgaja, sensuna,
Ne haltas la ventoj kaj pluvo aŭtuna;
Miaj pensoj sin tenas je tempoj pasintaj,
Sed falas en vento esperoj velkintaj,
Kaj la tagoj — malvarmaj, sensunaj.

Ekhaltu, ho koro malgaja, ne plendu!
Post nuboj la suno radias — atendu!
Ne sola vi tiel kun sorto batalas,
En vivo de ĉiu la pluvo ja falas,
Kelkaj tagoj — malvarmaj, sensunaj.
(El: Longfellow) (Fund. Krestomatio)

Ni komprenis tiujn mal- kaj sen-vortojn ne laŭ la vojo: varma — malvarma, — suna — sensuna, sed senpere, rekte. Kaj la poemo agordis nin malgaja, same kiel nuba pluva tago en novembro en nordaj landoj. Ni admiras la tradukinton, kiu sukcesis redoni en fremda lingvo la sentojn de la aŭtoro kaj tiel estigi la saman animstaton ĉe la leganto. La kelkfoja ripetiĝo de *mal* ne ĝenis nin, sed ĝuste kontribuis al tiu agordiĝo.

Jen, do, ekzemplo pri la utilo de ripetiĝo!

Kontraŭe, vortoj, kiujn ni malofte aŭ neniam legas, aŭdas aŭ uzas, restas al ni fremdaj, kaj pro tio ne elvokantaj. Al la ekzemplo de Waringhien ni aldonu propran: por iu traduko ni bezonis la vorton *eglefino*. Ni konfesas, ke, kvankam la tiel nomata fiŝo estas tre populara en nia lando kaj Esperanto jam multajn jarojn nia ĉiutaga lingvo, ni devis serĉi la tradukon de tiu vorto en vortaro. La kaŭzo de tio estas, ke hejme ni neniam bezonis ĝin. Ni, nome, ne ŝatas tiun fiŝon kiel manĝaĵon; skve ĝi neniam venas sur nian tablon, nek en nian interparolon. Tial nia nacilingva vorto estas elvokanta, ne la Esperanta *eglefino*, almenaŭ por ni, sed por esperantista fiŝisto ekz. ĝi eble apartenas al ties ĉiutaga lingvo. Kaj tiel estas pri multaj aliaj vortoj, kaj ne nur en Esperanto.

Kiam ni eklernas Esperanton tamen ne ĉiuj vortoj estas al ni tute fremdaj. Vortojn ĉerpilajn el nia gepatra lingvo aŭ el lingvo fremda, kiun ni lernis stude, ni ne bezonas traduki, sed komprenas rekte, ekz. vortoj, kiaj *hundo*, *kato* kaj *lando* estas por ĝermanaj popoloj senpere ligitaj kun la objektoj aŭ imagbildoj, kiujn ili prezentas, same kiel la t. n. internaciaj vortoj, t. e. vortoj apartenantaj al multaj lingvoj aŭ akceptitaj de ili, ekz.: *doktoro*, *telefono*, *telegrafo*, *organizo* k. s.

Nun ni rigardu la neologismojn, kiuj estas uzate proponataj por anstataŭi la mal-vortojn, almenaŭ en poezio:

basa	— malalta	streta	-- mallarĝa
dura	-- malmola	tarda	— malfrua
febla	-- malforta	turpa	-- malbela
frida	— malvarma	magra	— malgrasa
humida	-- malseka	kurta	— mallonga
lanta	— malrapida	obskura	-- malluma
olda	— maljuna	plumpa	-- malgracia
pigra	-- mallaborema	povra	— malriĉa
rara	-- malofta	trista	-- malĝoja
softa	— mallaŭta	noci	— malutili

Ni komprenas, ke al la proponintoj ĉi tiuj vortoj estas pli elvokantaj ol la koncernaj mal-vortoj, ĉar ili jam konis tiujn radikojn, ĉu el sia gepatra lingvo, ĉu el lingvoj fremdaj, kiujn ili iam lernis kaj pli multe praktikis ol Esperanton.

Sed al tiuj, kiuj ne scias fremdajn lingvojn kaj kies gepatra lingvo ne estas identa, nek parenca al la lingvoj, el kiuj tiuj neologismoj estas prenitaj, tiuj vortoj diras same malmulte, kiel la samsencaj vortoj el la lingvoj sanskrita, japana aŭ bantua.

Al tia „unulingvulo“ estas tute egale, ĉu *febla* signifas *malforta* kaj *olda* = *maljuna* aŭ inverse, ĉar mankas al li la apogo de fremdaj lingvoj. Sed Zamenhof donis al li alian apogon: la afiksojn — ĉi kaze la prefikson *mal*, kaj la vortojn tiel kunmetitajn li komprenos komence efektive per ĉirkaŭvojo, sed poste — per ofta uzado — per vojo rekta, same kiel ni lernas ĉiun alian vorton novan.

Per regula praktikado de fremda lingvo ni vivigas la vortojn; ili ricevas por ni sian signifon kaj ni lernas pensi en ĝi; tial oni plej funde ĝin lernas, loĝante kelkan tempon en la koncerna lando, kie oni *devas* uzi ĝin. Por esperantistoj tiu „lando“ estas la lokaj grupoj, la internaciaj kongresoj, la interpersonaj paroloj kaj korespondaj rilatoj inter kaj ekster la limoj de la propra lando, kaj ne malplej nia literaturo. Entute la atmosfero de nia celado.

Povi uzi la lingvon tiom intense, kiom nian gepatran lingvon, postulas persistajn penadon kaj ekzercadon, por kiuj ni uzu ĉiun taŭgan okazon. Oni pripensu, ke ion valoran oni neniam akiras senpene! La ofta kontraŭdiro, ke „en interrilatoj naciaj oni uzu la nacian lingvon, ĉar Esperanto estas destinita nur por rilatoj internaciaj“, ŝajnas al mi travidebla preteksto por kaŝi oportunemon. Oni legu la opinion de Zamenhof pri la uzado de Esperanto en nacia kadro en Originala Verkaro, paĝo 401.

En la multaj Esperanto-kongresoj, kiujn ni partoprenis, frapis nin ĉiufoje denove, kiom facile kaj lerte multaj „unulingvuloj“ manipulas Esperanton, kiom flue ili defendas sian opinion aŭ atakas opinion kontraŭan, kiom verve ili esprimas sian kritikon, indignon, koleron kaj plezuron kaj kiom tuje ili reagis per konsentaj, malaprobaj aŭ ŝercaj interrompoj, eĉ per vortludoj. Mal-vortoj ne ĝenas ilin, nek la aŭskultantojn La kaŭzo? Ĉar Esperanto en ili vivas!

Kontraŭe, pluraj aliaj, eĉ kleruloj pretendantaj scii kelkajn lingvojn, balbutas, serĉas vortojn, evidente tradukas, ĉar mankas al ili konstanta praktikado, kaj pro tio Esperanto por ili ankoraŭ ne estas elvokanta.

La favorantoj de la „anti-mal-vortoj“ proponis ilin por la poezio, por la alta literatura lingvo, por krei ekvivalentojn de tiuj vortoj, kiuj en naciaj lingvoj estas uzataj en „alta stilo“, ne en la ĉiutaga vivo.

Ĉu la Esperantaj ekvivalentoj de tiaj vortoj vere esprimas la „alt-sferan signifon“, kiun la poetoj volas sentigi al ni?

En sia verko „Kien la poezio?“ Brendon Clark diras pri tio:

„La argumentado, ke la neologismoj en Esperanto estas analogaj al la poeziaj vortoj de la naciaj lingvoj, estas disputebla. Plej parte

tiuj poeziaj vortoj estas postvivantoj de iu antaŭa formo de la sama lingvo: ili ne estas la nekonataj antaŭirantoj de ia estonta formo.“

Grava demando estas: ĉu la legantoj *rekonas* en tiuj vortoj ion similan al la literaturaj aŭ poeziaj vortoj el siaj naciaj lingvoj? Ni sincere konfesas, ke ĝis nun ili impresas nin kiel vortoj fremdaj, sen ia speciala koloro aŭodoro. Kaj tiun impreson havas ankaŭ multaj aliaj esperantistoj. La kaŭzo estas evidenta: en naciaj lingvoj tiaj vortoj apartenas al altstilaj literaturajoj, kiel poemoj, paroladoj, predikoj k. s. Kaj limigitaj en tiu kadro ili konservis sian aromon. Sed uzataj en la ĉiutaga lingvo ili sonas komike.

Nia lingvo estas ankoraŭ juna, tre juna. Pro tio la priparolitaj neologismoj ankoraŭ ne distingiĝas kiel vortoj poeziaj kaj altprozaj. Kaj ili neniam distingiĝos tiaj, se niaj aŭtoroj ne ĉesos uzi ilin en la ordinara, ĉiutaga literaturo.

Se Esperanto efektive bezonas vortojn literaturajn, la uzado klare montru ilin tiaj. Ili aperu do ekskluzive en poezio kaj en altstila prozo. Nur en tiu okazo ili povos iom post iom ricevi la diziratan aromon, dum la mal-vortoj ne forglitos el la uzado kaj la lumo, kiu iam falis sur la terurajn grandegajn vortarojn, ne estingiĝos!

b. Aliaj neologismoj.

Krom la neologismojn, kiuj celas anstataŭi mal-vortojn, oni jen kaj jen uzas aliajn neologismojn nenecessajn, ĉar ekzistas taŭgaj vortoj por ili en la fundamenta lingvo, ekzemple: *ascendi* kaj *descendi* = resp. *supreniri* kaj *malsupreniri*: oni *ascendas* aŭ *descendas* ŝtuparon. Kial ne oni *supreniras* aŭ *malsupreniras* la ŝtuparon? „Ili estas tro longaj“, oni diras. Nu, ni uzis dum 35 jaroj Esperanton en la ĉiutaga vivo, sed neniam trafis nin la troa longeco de tiuj vortoj. Ankaŭ pri tio ni devas diri, ke la kaŭzo estas, ke *supreniri* kaj *malsupreniri* estas por ni vortoj vivantaj. Kaj tial neniel fremdaj aŭ strangaj. *Ascendi* kaj *descendi* ni sentas kiel vortojn fremdajn, same kiel alilingvaj vortoj en nia gepatra lingvo, kiujn ni kontraŭbatalas, se nia gepatra lingvo jam posedas taŭgajn vortojn kaj ne bezonas prunti el lingvoj fremdaj.

Ne ekzistas motivo kontraŭbatali vortojn *internaciaj*. Ekz. oni povas uzi *kremacio* apud *cindrigo*; *evolui* apud *disvolviĝi*; *aŭtoro* apud *verkinto*, *verkisto*, *farinto*; *braceleto* apud *ĉirkaŭmano*; *redakcio* apud *redaktado*, *redaktoraro*, *redaktejo*; *administracio* apud *administrado*, *adminisstrantaro*, *administrejo*; *inspektoro* apud *inspektisto*; *prononco* apud *elparolo*; *giganto* apud *grandegulo* k. t. p.

Tiuj internaciaj vortoj posedas en nia lingvo validan pasporton laŭ regulo 15-a de Plena Gramatiko de Esperanto el la Fundamento:

„La tiel nomataj vortoj *fremdaj*, t. e. tiuj, kiujn la plimulto el la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la fundamentan kaj la ceterajn formojn de tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de lingvo Esperanto.“

Sed kial *floto* apud *ŝiparo*? Kial *bunta* apud *dukolora*, *diverskolora*, *multkolora*; *ascendi* apud *supreniri*; *descendi* apud *malsupreniri*; *incendio* apud *brulego*; *reportero* apud *raportisto*; *polmo* apud *manplato*; *pojno* apud *manradiko*; *kirko* apud *preĝejo*; *polekso* apud *dikfingro*; *gluteo* apud *sidvango*; *pado* apud *vojeto*; *desaponti* apud *seniluziigi*; *evento* apud *grava okazaĵo*; *spektatoro* apud *rigardanto* k. t. p.?

Jen vortoj, kiujn mi kolektis, ne el poezio aŭ alta prozo, sed el komunlingvaj artikoloj, noveloj, romanoj.

Kial la verkintoj uzis tiujn vortojn? Se ili juĝus ilin pli internaciaj ol la fundamentajn, profitus el tio nur tiuj, kiuj scias la lingvojn, el kiuj ili estas prenitaj. Sed la „unulingvulo“ kies gepatra lingvo ne kontribuis al tiu listo, nur *malprofitas*!

Ĉu ili opinias la novajn vortojn pli belsonaj? Ni opinias la malnovajn ne malpli belsonaj. Ĉu ili trovas la malnovajn tro longaj, tro kunmetitaj, ne sufiĉe elvokantaj? Nu, se oni uzas Esperanton tiom regule, ke ĝi iĝis familiara, tiam vortoj, kiaj ekzemple *malsupreniri* kaj *seniluziigi* estas same facile uzablaj kaj same elvokantaj, kiel vortoj unu-aŭ duelementaj.

Kutimo kaj rutino venkas la komencajn barojn!

★

Ĉu ni kontraŭu do *ĉiujn* neologismojn? Kompreneble ne! La vivo, la socio, la tekniko, la scienco konstante evoluas kaj kune kun ili evoluas la lingvo, kiun ili trapenetas. Observu ekzemple dum nur unu tago la uzon de via nacia lingvo kaj vi konstatos, ke plurfoje vi surpaŝas sciencan aŭ teknikan terenon. Nuntempe ni ne povas malhavi vortojn, kiaj *demoralizi*, *diskrediti*, *partizano*, *staplo*, *rapsodio*, *tom-bolo*, *valuto* (ĉiuj Zamenhofaj) kaj: *aspirino*, *buldozo*, *celofano*, *devalui*, *difterio*, *elektrono*, *fascini*, *gabardino*, *garaĝo*, *helikoptero*, *hormono*, *insulino*, *kakia*, *mentolo*, *mitralo*, *nilono*, *penicilino*, *plasto*, *erodi*, *vitamino*, *viskozo*, *viruso*, *reaktoro*, *sero*, *roboto*, *saboti*, *stencilo* k. t. p.

Klopodi bari la eniron en la komunan lingvon de tiuj kaj similaj vortoj kaj anstataŭigi ilin per vortoj priskribaj, estus malracie, eĉ neeble.

Sed ni povas --- kaj eĉ devas --- kontraŭstari tiajn neologismojn, kiaj efektive estas nenecesaj en la komuna lingvo, precipe tiajn, kiaj celas nuligi la sistemecon de Esperanto, aboli la uzadon de afiksoj kaj klasikaj kunmetaĵoj kaj per tio ĝiajn plej karakterizajn kaj allogajn trajtojn, kiuj faras la lingvon facile lernebla eĉ por tiuj, kiuj ricevis nur elementan instruon.

En la alta literaturo — proza kaj poezia --- la aŭtoroj kaj tradukantoj havu la rajton uzi siajn specialajn vortojn literaturajn, kondiĉe, ke ili klarigu ilin, sed ili ĉesu uzi ilin en artikoloj, noveloj, romanoj kaj aliaj verkoj, por kiuj la klasikaj formoj kaj esprimmanieroj sufiĉas. Se ili agas tiel, kaj se ni, legantoj, ĉiam protestos ĝustatempe — t. e. antaŭ ol la nova, nenecesa neologismo estos sankciita de la uzado — tiam ni kune tenas la evoluon de la lingvo en egalpezo!

c. La karaktero de „Plena Vortaro“.

Kiam ni riproĉis nian maljunan amikon, ke li uzis la neologismojn *febla* kaj *olda* (en *oldiĝi*) anstataŭ *malforta* kaj *maljuniĝi*, li respondis al mi: „Sed ili ja troviĝas en Plena vortaro!“

Tiun respondon oni plurfoje povas aŭdi, tamen ĝi montras miskomprenon pri la karaktero de Plena Vortaro kaj pri la tasko de la vortaristo. Oni pensas, ke Plena Vortaro estas oficiala, almenaŭ ke ĉiuj vortoj en ĝi estas rekomendindaj!

Kiom ajn ni admiras Plenan Vortaron --- oficiala ĝi ne estas kaj ne ĉiuj vortoj en ĝi estas rekomendindaj!

La tasko de vortaristo estas registri ĉiujn vortojn uzitajn en la literaturo, por ke la leganto, kiu renkontas nekonatan vorton, povu trovi ĝian signifon en la vortaro. Pri Plena Vortaro, tio ne signifas, ke la koncerna vorto estas oficiala aŭ rekomendinda. La uzantoj atentu, ĉu la vortoj en Plena Vortaro komenciĝas per grandlitero — kio signifas *oficiala* — aŭ per malgrandlitero — kio signifas *neoficiala*. Montriĝis tamen, ke tiu diferencigo inter „oficiala“ kaj „neoficiala“ al multaj ne estas sufiĉe klara. Eble estas pli bone estontece presigi la neoficialajn vortojn ruĝaj!

Oni uzu neologismon el Plena Vortaro nur, se la lingvo ne disponas pri taŭga vorto oficiala!

Oni ankaŭ ne mem kreu facilanime novan vorton, sed antaŭe bone pripensu la intencon. La jena ekzemplo estu instruo: la vorto *preĝejo* signifas „konstruo en kiu oni preĝas“ (P. V.), do ankaŭ judaj kaj mahometanaj konstruoj, en kiuj oni preĝas estas preĝejo, kvankam oni prefere nomas ilin resp. *sinagogo* kaj *moskeo*.

En la lasta tempo aŭdiĝis propono enkonduki por kristanaj preĝejoj la vorton *kirko*, kiu propono naskiĝis evidente el sento pli simetrio: „se judoj kaj mahometanoj posedas apartan vorton por tiu konstruo“, oni rezonas, „kial do ne ankaŭ kristanoj havu ĝin?“

Ni ne volas tuŝi la demandon, ĉu la vorto *kirko* estas tiom internacia, kiom *sinagogo* kaj *moskeo*; pli grava demando estas: ĉu aparta nomo por kristana preĝejo estas necesa? Ni opinias, ke ne. La uzado de *sinagogo* kaj *moskeo* limigis la signifon de *preĝejo* al: „konstruo en kiu preĝas kristanoj“. Ĉiu mem povas konstati tion: legante la vorton *preĝejo*, pri kio ni pensas? Ordinare pri *kristana* ne pri juda aŭ mahometana preĝloko. En la praktiko ĝi do estas konata preskaŭ nur en tiu signifo. Kial do enkonduki la vorton *kirko*? La evoluo donis al *preĝejo* duan signifon kaj ni opinias, ke estas konsilinde registri ĝin en Plena Vortaro.

Neologismojn oni kreu nur en okazo de vera bezono. Tiu bezono ne montriĝis koncerne la vorton *kirko* kaj koncerne plurajn aliajn.

Okaze de la Universala Kongreso en Marseille en 1957 la Akademio en publika kunveno traktis la temon pri la uzado de neologismoj, kontraŭ kies trouzo jam multaj protestis. Granda nombro da ĉeestantoj partoprenis en la diskuto kaj lumigis la demandon el siaj vidpunktoj. La ĝenerala opinio estis, ke oni ne povas kaj ne devas forlasi ĉiujn neologismojn, sed ke tamen oni devas limigi la enkondukon de novaj vortoj al tiuj, kiuj estas vere necesaj.

10. Bona stilo estas en harmonio kun la temo.

„Filmomuziko devas esti en harmonio kun la filmo, kiun ĝi akompanas. La filmo kaj ĝia muziko devas formi unu tuton. La publiko ne rimarku la muzikon aparte. Muziko, kiu turnas la atenton for de la filmo, ne taŭgas. Ju pli harmonie la muziko rilatas al la filmo, des pli intense ni travivas la dramon.“

Tiel iam parolis filmo-recenzisto. Simile oni povas paroli pri temo kaj stilo. La stilo devas esti en harmonio kun la temo kaj formi kun ĝi unu tuton. La leganto ne rimarku la stilon aparte. Stilo, kiu turnas la atenton for de la temo, malhelpas glatan komprenadon. En niaj gazetoj kaj literaturo ni renkontas jen kaj jen frazojn, kiuj, kvankam gramatike senriproĉaj, estas tiom komplike konstruitaj, ke ili similas ĵigojn.

Se la leganto, ne povante sekvi tuj la akrobataĵojn de la aŭtoro, devas relegi kaj denove relegi tiajn frazojn — se li krome devas jen kaj jen konsulti vortaron por serĉi la signifon de tute nenecesaj neologismoj — tiam la legado ne donas al li plezuron. Niaj aŭtoroj komprenu, ke tia frazkonstruo, jam malklara al leganto, tute ne estas komprenebla al aŭskultanto, al kiu ja mankas tempo por ĵige reordigi la vortojn en frazon tuj kompreneblan. Ili pripensu, ke ju pli simple io estas dirita, des pli klara tio aperas sur la spirita ekrano de la leganto aŭ aŭskultanto. Kiom ajn ni penadu, por ke la teksto estu gramatike korekta, tamen la enhavo restas la ĉefafero. La lingvo ne distru nin for de la temo. Tial estus utile, se aŭtoro legus sian verkon laŭte al si mem aŭ al amiko. Ne nur la okuloj, sed ankaŭ la oreloj juĝu, ĉu ĝi estas klara kaj flue komprenebla.

„Por la rapideco de la orela komprenado“, skribis Prof-o Bourlet en 1910 en la tiama Oficiala Gazeto Esperantista, „estas absolute necese, ke la stilo de la lingvo unuformiĝu, ĉar lingvo konsistas ne nur el apartaj vortoj kaj el gramatikaj reguloj, sed ankaŭ kaj precipe el antaŭe preparitaj frazoj kaj kutimaj esprimoj. Se du samnaciaĵoj povas interkompreniĝi malgraŭ tre rapida kaj malbona prononcado, tio estas ebla nur tial, ĉar ili uzas kutimajn frazojn, antaŭpreparitajn kliŝaĵojn, kies tuton oni tuj komprenas, se oni aŭdis nur parton.“

Ĉi ĉio ne ekskluzivas propran stilon, eksterordinarajn dirmanieron kaj frazkonstruon, per kiuj la aŭtoroj donas al siaj ideoj personan formon, kiu pli klare bildigas ilin ol stilo ĉiutaga. Ekzemplon pri tia persona stilo ni trovas en la verkoj de d-ro Edm. Privat: „Vivo de Zamenhof“, „Interpopola konduto“, „Esprimo de sentoj en Esperanto“. En tiuj verkoj la stilo prezentas nenion, kio povus turni nian atenton for de la temoj. Male, ilia stilo helpas al pli intensa kompreno kaj travivo de la temoj, ol se la aŭtoro estus uzinta stilon ordinaran.

★

Estas rimarkinde, ke, esprimante sin en Esperanto senpere, oni ordinare uzas lingvaĵon simplan, facile kompreneblan. En ekzemple „Viktimoj“ kaj „Kredu min, sinjorino“ ni ne estas ĝenataj de komplikaj aŭ torditaj stiloj, kiuj devigas nin „ĵigi“, sed povas dediĉi nian tutan atenton al la enhavo. En tiuj verkoj frapantaj frazturnoj, esprimoj aŭ vortelektio ne distras nian atenton sed ĝuste kontribuas al pli bona kompreno. Se interesas nin ilia lingvaĵo, la stilo, tio estas pro tio, ke ĝi tiel klare kaj originale esprimas tion, kion la aŭtoroj volas komuniki kaj sentigi al ni.

Sed tradukante oni estas sub influo de la lingvo de l' originalo kaj tiu influo ofte kaŭzas komplikajn frazkonstruon, malbele sonantajn

vortkombinojn, k. t. p. Tial la cetere laŭdinda penado precize sekvi la originalon, ne ĉiam donas al la leganto la saman impreson. Ofte oni povas per malpli preciza sekvado akiri pli precizan rezulton. La tradukanto ja devas redoni ne nur la nudajn faktojn, sed ankaŭ la atmosferon, la sentojn, la emocion, kiun la aŭtoro de la originalo volas sentigi aŭ vekti en la leganto. Por tio ne ĉiam sufiĉas tradukado laŭvorta.

Ni kutimas diri, ke Esperanto estas facila lingvo. Kvankam tio estas nur relative ĝusta, ni tamen pripensu, ke ĝian facilecon ni ne pruvus per malsimpla aŭ tordita stilo.

★

Por proprigi al si la Esperanto-stilon, ne ekzistas pli bona rimedo ol legi kaj relegi bonstilajn verkojn. Kaj fidinda rimedo por kontroli nian stilon estas laŭtlegado. La lango kaj la oreloj estas atentemaj gardistoj, pli severaj ol la nuraj okuloj. Ili tuj rimarkas ĉiujn malglataĵojn en sonoj, frazkonstruo, frazritmo kaj kompreneblo, ĉar la voĉo reliefigas tiujn mankojn. Laŭtlegu vian verkaĵon antaŭ ol presigi aŭ publike eldiri ĝin. Zorgu, ke la leganto aŭ la aŭskultanto ne perdu la fadenon pro tio, ke lia atento devas okupi sin pri la lingvo, la stilo, anstataŭ pri la temo.

Via stilo estu en harmonio kun la temo kaj formu kun ĝi unu tuton!

Tabelo de la enhavo.

	Paĝo
Antaŭparolo	5
1. Kio estas stilo?	7
2. Bona stilo estas bonsona	8
a. Interpuŝiĝo de sonoj ne facile elparoleblaj	8
b. Ripetiĝoj	9
c. Aliaj ripetiĝoj	16
ĉ. Rimoj	18
3. Bona stilo estas klara	23
a. Konvencia vortordo	23
c. Ŝanĝo de vortordo	32
4. Bona stilo estas simpla	33
5. Forĵetu balaston	40
6. Bona stilo estas logika	42
7. Nesufiĉa akcento	49
8. Bona stilo estas varia	51
9. Evitu nenecesajn neologismojn!	53
a. La neologismoj anstataŭ la mal-vortoj	53
b. Aliaj neologismoj	58
c. La karaktero de Plena Vortaro	60
10. Bona stilo estas en harmonio kun la temo	61

Ne tiel, sed tiel ĉi...

Preskaŭ ĉiuj spertis, ke iuj libroj kaj artikoloj legiĝas facile, aliaj malpli facile.

Ni ĉiuj deziras havi facilan kaj elegantan stilon, tial F. Faulhaber volas helpi al ni per siaj konsiloj en ĉi tiu libro.

Estante ano de la Akademio, ano de la Literatura Komitato de SAT kaj recenzanto por pluraj Esp-gazetoj, Faulhaber devis kritike legi multajn Esp-verkojn. Li notis abundon da kritikindaj frazoj kaj esprimoj. Li prezentas ilin en ĉi tiu libro aldonante ilian preferindan formon.

Kun granda ĝuo vi legos, komprenos, admiros kaj imitos. Tiel ankaŭ vi iom post iom fariĝos bona stilisto.

La enkondukon de la libro verkis s-ino E. Burgler-Jezsó, redaktorino de „La Praktiko“.

La Eldonisto.